

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

116-a jaro • n-ro 1379 (5) | majo 2023

Artefarita intelekto, neŭroretoj kaj Esperanto | 99

"Iusence, jes, ĝi spertas pri verkado en Esperanto" | 102

Strategia planado — survoje al la enketilo | 104

79-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO | 110



Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908
de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon,
la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo
Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran
bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la
evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbeek
Kovrilpaĝo kreita helpe de AI Midjourney

Artikoloj de privatuloj ne reprezentas oficialan sintenon
de UEA. La aŭtoroj respondecas pri siaj artikoloj
enhave kaj lingve.

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto, Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044

<https://revuoesperanto.org>
redakcio@revuoesperanto.org

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande;
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 5,00.
Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifo (EUR):

1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.

Rabato por tuja ripeto 20%.

Anoncetoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas
minimume €20,00). Mendu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam

Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,

BIC/SWIFT: INGBNL2A

(Universala Esperanto-Asocio en

Rotterdam, Nederlando)

PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ

Rotterdam, Nederlando.

tel.: +31-10-436-1044

uea@co.uea.org www.uea.org


Enhavo



99

Artefarita intelekto, neŭroretoj kaj Esperanto


Ni, esperantistoj, iam eniris en la interretan
epokon, interalie inter la unuaj vicoj de la
retuzantoj kaj retkreantoj. Nun venis la
sekva alia epoko.



102

"Iusence, jes, ĝi spertas pri verkado en Esperanto"

Intervjuo kun Martin Rue pri Artefarita
Intelekto en literaturo kaj aliaj specoj de
arto. Fine de marto Martin prelegis pri
tiu temo dum la Literatura Duonmarato
kaj vekis grandan intereson de la
publiko pri tiu tre aktuala temo.



104

Strategia planado — survoje al la enketilo

Mi atentigis antaŭe ke d-ro Zamenhof
estis firme konvinkita ke nenio malhel-
pos la finan akcepton de Esperanto
KROM kverelado inter la esperantistoj.



110

79-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: edukado, sporto, kaj suno por ĉiuj generacioj

La 79-a IJK de TEJO debutas sub nova
sistemo de IJK-organizado: ĝin organizas
la internacia Kongresa Komisiono (KK)
el aktivuloj el pluraj landoj, kiuj pretigas
ĝian efektivan enhavon kun la konstanta
subteno de loka kongresa teamo.

Oficiala Informilo | 103

Faka agado | 106
Projekto Verden en
fina fazo |

Afriko brilas | 107
Internacia Virina Tago |

Historio | 108
Laŭlum, en nia
memoro |

Landa agado | 112
Sukcese okazis la 5-a
Speciala Ekskurso 2023
en Nepalo |

Edukado | 113
Papere, Poŝte, tamen
Persiste |

Eventoj | 114
Raporto pri la Junulara
Esperanto-Semajno
2022-2023 kaj kial ĝi
estis elstare unika |

Landa agado | 115
Revigliĝas la renkontoj
en la Paraĭba-Valo |

Esperanto en Orienta | 116
Timoro: mallonga
historio kaj nia nuna
agado |

Fake, Science kaj | 118
Profesie tra la mondo
Movadumi en la post-
Jarlibra epoko |

UEA | 119
Programo "Ni
semas" de la Afrika
Komisiono: alvoko
2023 al projektoj |

de Universala
Esperanto-Asocio

Estraro

Prezidanto: D-ro Duncan Charters
(Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro
kaj Dokumentado)
PO Box 100, Elsalh, IL 62028-0100, Usono
Tel. +1 618 374-2453
uea.prezidanto@aol.com

Vicprezidanto: S-ro Fernando Jorge
Pedrosa Maia Jr. (Centra Oficejo, Financoj,
Kulturo, Kongresoj, Reta Agado, Ameriko)
R. Andrade Pertence 42/503 Rio de Janeiro
RJ Brazilo 22220-010
Tel. +55 21 967767084
fmaiajr@gmail.com

Vicprezidanto: D-ro Amri Wandel
(Scienco kaj Faka Agado, Revuo Esperanto,
Terminologio, Meza Oriento kaj Norda
Afriko)
767 Makabim, 7179901 Modiin, Israelo
Tel. +972-54-454-8712
amriwandel@gmail.com

Ĝenerala Sekretario: S-ro Aleks Kadar
(Administrado, Delegita Reto, Rilatoj kun
Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj
kun TEJO, Statuta Reformo)
197 rue de Lourmel
FR-75015 Paris, Francio
Poŝtel. +33 6 86 58 00 20
alekska@gmail.com

Membro: S-ino Aurora Bute
(Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo)
Str. Brândușei nr. 6, Sc. C, ap.1
RO-300626 Timișoara, Rumanio
Poŝtel. +40 758 899 289
aura.bute@gmail.com

Membro: D-ro François Lo Jacomo
(Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de
Esperanto, Esperanto-Centroj, Gemelaj Urboj)
72 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio
Poŝtel. +33 6 80 88 53 27
francois@lojacomo.eu

Membro: S-ro Jérémie Sabiyumva
(Aktivula Maturigo, Afriko)
BP 170 Rumonge, Burundo
Tel. +257 79218342 / 69066457
jerrybs21@gmail.com

Membro: D-ro So Jinsu
(Eldonado, Azio kaj Oceanio)
Mapo-gu Tojeong-ro 158, Hangang Bamsom
Xi Apt. 102-2401, Seoul 04080 Koreio
Tel. +82-10-8898-1818
so@kangnam.ac.kr

Observantoj de TEJO:
S-ro Albert Stalin Tancinco Garrido
kaj S-ro Tyron Surmon

Observanto de ILEI:
Ing. Ahmad Reza Mamduhi

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>

Artefarita intelekto, neŭroretoj kaj Esperanto

■ Dima Ŝevĉenko



En la aprila numero de *Esperanto* en 2017 (p. 87) aperis mia artikolo kun la titolo “Strategia prioritato de la Esperanto-movado: reta esperantista infrastrukturo”. En ĝi mi emfazis la problemon, ke la interretaj projektoj, kiuj estis kreitaj de neesperantistoj, sed tamen disponigas servojn por esperantistoj aŭ uzas Esperanton, ne povas esti la sola kaj garantiita rimedo por antaŭenigi la Esperanto-movadon. Estas grave, ke nia lingvo diversskale ape-

ru tie, sed oni ja ne havu iluzion, ke tio estas la fundamenta bazo de la interreta Esperanto-mondo. La tempo montris plurajn ekzemplojn de seniluziigoj pri diversaj servoj: kaj la menciita en tiu artikolo en 2017 Ipernity, kiu iam estis “ĉefa socia reto de Esperantujo”, kaj nun ankaŭ haltigo de subteno de pluraj Esperanto-kursoj kaj nuligo de tre aktivaj Esperantaj forumoj en Duolingo. Jes, eblas konstati, ke la lasta portis multajn novajn esperantistojn al la movado, kvankam ne tiagrade, kiel prognozis kelkaj analizistoj.

Sed ni konstatu, ke *Lernu.net*, kiu estas unu el niaj ĉefaj retaj spacoj por instrui Esperanton, estis lanĉita en 2002 kaj funkcias jam pli ol 20 jarojn! Jes, dum ĝia evoluo aperis kaj aperas certaj kritikoj, sed ni devas konfesi, ke tio estas ĝis nun la plej stabila interreta sistemo por lerni nian lingvon.

Tamen nun ni parolu ne pri tio. En la historio okazas tiel, ke unu epoko postsekvas la alian. Ni, esperantistoj, iam eniris en la interretan epokon, interalie inter la unuaj vicoj de la retuzantoj kaj retkreantoj. Nun venis la sekva alia epoko kaj jam ne simple frapas nian pordon, sed aŭdace transpasas la sojlon de nia hejmo. Kaj ni ne povas ignori tiun temon.

Tradicie dum jardekoj esperantistoj multe interesiĝis, ekzemple, pri la maŝintradukado. Ĉu vi memoras kion da furoro estis, kiam estis lanĉita aŭtomata tradukado el kaj en Esperanton en la reta servo Google.Translate kaj aliaj? Nun ni plonĝas en ion tute novan, multe pli evoluigitan.

Dum la lastaj monatoj preskaŭ en ĉiuj medioj ekflamis la temo de neŭroretoj kaj artefarita intelekto (AI). Pri ili parolas kaj la ŝtatestroj, kaj parlamentanoj, kaj simplaj homoj.

Tiuj ĉi sistemoj jam ekzistis kaj evoluis jam de pluraj jaroj, sed nur nun oni tiom amase malfermis ilin por la uzo de la ĝenerala publiko. Kaj tio kaŭzas nun multajn demandojn kaj diskutojn, foje ankaŭ polemikajn kaj akrajn. Aperas pluraj analizoj, inter ili la plej ofta temo, kiun oni diskutas, estas kiel influos AI al la evoluo de diversaj profesioj, ĉar uzo de ĝi preskaŭ en ĉiuj fakoj povas ŝanĝi, kaj jam fakte ŝanĝas alirojn al la kutimaj laborprocedoj. AI jam multon povas fari parte aŭ plene anstataŭ tradukistoj, programistoj, instruistoj, librotelistoj ktp. Granda “demandosigno” pendas super la lerneja kaj universitata laboro kaj edukado, jam estas pluraj precedencoj, ke havante aliron al la modernaj sistemoj,



lernejanoj kaj studentoj “fulme plenu-
mas” hejmajn taskojn kaj eĉ foje “ver-
kas” diplomlaboraĵojn. Ankaŭ estas
multaj demandoj pri sekureco kaj even-
tua fi-uzado de AI – ja novaj inventoj
kaj teknologioj povas havi ne nur po-
zitivajn flankojn. Kiel, ekzemple, la iam
inventita fendigo de atomkerno aŭ eĉ
la interreto mem. Necesas konstati, ke
homoj kaj la ŝtatoj ambigue akceptas
AI-sistemojn. Tiel, ekzemple, en Italio
oni decidis bloki unu el tiuj sistemoj, la
plej popularan nun, kiu nomiĝas Chat-
GPT, kiu estas regata de la neprofitcela
organizaĵo OpenAI. Nun ĝi povas esti
uzata per diversaj sistemoj, pe-
re de aplikaĵoj por la saĝtelefonoj, re-
tumiloj kaj eĉ per Telegram-roboto.

Nuntempe oni ne povas plene ob-
jektive prognozi kiel evoluos la afero.
Ĉu tio estas bono aŭ malbono por la
homaro? Kiujn danĝerojn povas havi
AI? Neniu dume havas certan respon-
don. Tamen, laŭ mi indas konscii kaj
akcepti la fakton, ke AI jam ekzistas en
nia nuntempa objektiva realo.

Kio pri Esperanto en tiu ĉi kun-
teksto? Nu, ekzemple, ChatGPT “ko-
nas” Esperanton. Ĝi kapablas ne nur
traduki, sed ankaŭ analizi la tekstojn.

Nia redakcio turnis sin al Chat-
GPT kun du demandoj, kiuj interesas
movadanojn kaj ankaŭ komencantojn
(estis uzita por nun jam “malnova ver-
sio ChatGPT-3”, tamen la respondoj ve-
nis en sufiĉe bona Esperanto, ni kon-
cizigis ilin). Gramatikaĵoj kaj stilo de la
respondoj estis konservitaj:

Revuo Esperanto: *Kiun estonte-
con havas Universala Esperanto-Asocio?*

ChatGPT: Kiel virtuala intelligen-
ta verkilo, mi ne povas ekzakte antaŭ-
vidi la estontecon de UEA, tamen estas
kelkaj aspektoj, kiuj povus influi ĝin:

1. Socia kaj media: Kun la rapidaj
povoj de sociaj amaskomunikiloj, UEA
povus disvastigi kaj plibonigi siajn ko-
munikajn kaj strategiajn kapablojn.

2. Kreskigo de Esperanto-grupoj:
La komunumo de esperantistaj homoj
povas kreski per pli kaj pli ampleksaj
teknologiaj ebloj. UEA povas disvas-
tigi sian membrecon kaj plibonigi sian
kunlaboradon tra teknologio.

3. Nova strategio: UEA povas evo-
luigi novajn metiojn kaj strategiojn por
reklamado de Esperanto, kiel ankaŭ
aranĝado de kongresoj, ĝisdatigado de
lingvkontaktoj, kaj plibonigado de in-
strurimedoj.

4. Pligrandigo de Esperanto-uzan-
toj: Esperanto povas esti uzata propa-
re por la internacia komunikado por
retpoŝto aŭ la retaj ĵurnaloj, reciproke
rekte kaj ne tradukite.

[...]

Tial, mi sugestas, ke UEA devus
progredi samtempe kun la evoluigo de
la homaj socioj en la monda reto kaj la
kreemo en novaj planoj.

Revuo Esperanto: *Kiajn perspek-
tivojn havas Esperanto?*

ChatGPT: Esperanto havas mul-
tajn perspektivojn, kiel lingvo kun
potencialo por komunikado inter ho-
moj de malsamaj kulturoj, popoloj kaj
lingvoj. Jen kelkaj el la perspektivoj de
Esperanto:

1. Kiel internacia lingvo. Espe-
ranto estis origine kreita kiel interna-
cia lingvo por faciligi interkompre-
non kaj komunikadon inter homoj de
diversaj lingvoj. Do, Esperanto uzas
multnombrajn komunajn vortojn kaj
facilajn gramatikajn regulojn, tiel ke
lerni Esperanton estas relative simple
kaj rapide, kompare kun lernado de
naturaj lingvoj.

2. Kiel instrua lingvo. Esperanto
ankaŭ havas la potencialon esti in-
strua lingvo, tial ke ĝi estas simpla kaj
neŭtrala.[...]

3. Kiel literatura lingvo. Esperan-
to havas propran literaturon, konsis-

tan el poezio, prozo kaj dramoj, kies
verkistoj venas el diversaj lingvoj kaj
kulturaĵoj. [...]

4. Kiel komunikilo. Esperanto
ankaŭ uzatas kiel komunikilo en spe-
cialaj kazoj, kie aliajn lingvojn ne facile
komprenos multnaciaj partoprenantoj.
[...]

5. Kiel movado kaj kultura for-
mado. Esperanto ankaŭ funkcias kiel
movado kaj kultura formado. En la
mondmovado de Esperanto oni orga-
nizas internaciajn kunvenojn, konkur-
sojn kaj temajn eventojn, kiel ekzemple
la restado ĉe loĝantoj en fremdlandoj
[...]

Esperanto havas grandajn pers-
pektivojn, kaj estas forta formato por
interpolaj kaj lingvigaj rilatoj.

Do, la unua respondo enhavis 176
vortojn kaj la dua 278. Kiel vi vidas
AI kapablas sufiĉe klare fari analizon
kaj ĝi konstante “lernas” kaj pro tio
plibonigas. Kiam vi legos tiun ĉi arti-
kolon, ĝi jam eventuale povos respon-
di pli precize kaj amplekse al la samaj
demandoj.

Nuntempe pluraj kompanioj, ek-
zemple Google, malfermas eblon uzi
AI-sistemojn al siaj klientoj kaj al la
ĝenerala publiko. Ili nun kapablas krei
bildojn, fotojn, sondosierojn kaj eĉ fil-
metojn. Ekzemple, nia redakcio eks-
perimente kreis la kovrilpaĝon de ĉi
tiu numero, samkiel portreton de la
aŭtoro de tiu ĉi artikolo kaj aliajn ilus-
traĵojn, uzante neŭronet, kiu nomi-
ĝas Midjourney. Ĝia populareco por
tiaspecaj taskoj kreskis lastatempe la-
vangsime.

Kvankam fulmrapide evoluas an-
kaŭ la aŭdvidaj AI-sistemoj, por espe-
rantistoj ĉefe nun tre aktualas sperto de
uzo de tekstaj AI-sistemoj en Esperan-
to. D-ro Giridhar Rao, membro de la
Akademio de Esperanto, eksperimentis
ĉu AI povas kompreni la diferencon
ne nur inter lingvo kaj dialekto, sed
ankaŭ inter la “simpla Esperanto” kaj
“[akademia] malsimpla Esperanto”. Jen
la koncizigita versio de la respondoj
(estis uzita versio de AI ChatGPT ak-
tualata por la 23-a de marto 2023, ankaŭ
ĉi tie ni konservis la gramatikaĵon de
la maŝino):

G.R.: *Kun ekzemploj, kaj en simpla Esperanto, klarigu la diferencon inter lingvo kaj dialekto.*

ChatGPT: Lingvo estas sistemo de komunikado, kiu havas propran gramatikon, vortprovizon, prononcon kaj literaturon. [...] Lingvoj estas interkompreneblaj inter siaj parolantoj kaj ofte asociatas kun nacioj, kulturoj kaj regionoj.

Dialekto estas variaĵo de lingvo, kiu havas siajn proprajn gramatikajn regulojn, vortprovizon kaj prononcon. Dialektoj estas ofte regionaj aŭ sociaj varioj de lingvoj, kiuj povas havi iom malsamajn vortojn aŭ prononcajn diferencon. [...]

La diferenco inter lingvo kaj dialekto estas ke lingvo estas pli vasta kategorio, kaj povas havi multajn dialektojn. Dialekto, aliflanke, estas specifa formo de parolado, kiu apartenas al tiu kategorio. [...]

G.R.: *Kun ekzemploj, kaj en malsimpla Esperanto, klarigu la diferencon inter lingvo kaj dialekto.*

ChatGPT: Lingvo estas kompleksa sistemo de simboloj kaj reguloj, kiu estas uzata por komunikado inter homoj. Ĝi inkludas ne nur la vortojn kaj iliajn signifojn, sed ankaŭ gramatikajn strukturojn, fonetikan kaj fonologian sistemon, sintakson, kaj aliajn aspektojn, kiuj permesas al homoj kompreni kaj produkti mesaĝojn. [...]

Dialekto estas variaĵo de lingvo, kiu estas uzata en specifa regiono aŭ de specifa grupo da homoj. Ĝi havas proprajn gramatikajn regulojn, vort-

provizon, prononcon, kaj sintakson, kiuj diferas de aliaj variaĵoj de tiu lingvo. [...]

La diferenco inter lingvo kaj dialekto estas ofte malklara kaj multaspeca, kaj la distingo inter ili povas dependi de sociaj kaj politikaj faktoroj. Tamen, ekzistas kelkaj diferencaj kriterioj, kiuj povas helpi distingi lingvojn de dialektoj. Unu kriterio estas interkonektebleco: lingvoj estas interkompreneblaj inter siaj parolantoj, dum dialektoj povas esti malfacile kompreneblaj por homoj, kiuj parolas alian dialekton de tiu sama lingvo. Alia kriterio estas normigado: lingvoj havas oficiale difinitan normon, dum dialektoj ne havas oficialan normon.

Tamen, en multaj okazoj la distingo inter lingvoj kaj dialektoj estas neklara kaj kontestita. En certaj kulturoj, certaj dialektoj povas esti rigardataj kiel apartaj lingvoj, dum en aliaj kulturoj ili povas esti rigardataj kiel nur variaĵoj de la sama lingvo. La distingo inter lingvoj kaj dialektoj estas do dependa de la socia kaj politika situacio en kiu ili estas uzataj.

Konklude:

La teamoj de Eventa Servo, de Retevento kaj aliaj kun arda kaj ĝustatempa subteno de UEA sukcesis provizi servojn, kiuj ne nur pliriĉigis la Esperanto-mondon kaj donis eblon al miloj da esperantistoj ne perdi la aktualajn kontaktojn kaj akiri novajn, sed ankaŭ puŝis la tutan movadon al pli kaj pli ciferiĝanta mondo, montrante praktike la daŭripovon de Esperanto.

Nun venis la tempo, ke UEA traktu ankaŭ AI-sistemojn vere serioze. La Asocio jam faras paŝojn tiudirekte. Tiel la 13-an de aprilo 2023 okazis anglalingva konferenco “Novaj teknologiaj horizontoj por tradukado kaj interpretado”, kiun partoprenis la NRO-Komitato pri lingvoj kaj lingvouzado, kiun gvidas Prezidanto Francis Hult kaj Vicprezidanto Humphrey Tonkin, reprezentantoj de UEA ĉe UN-Novjorko, kie estis traktitaj la perspektivoj kaj problemoj de AI kadre de tiu ĉi kampo. Do, ni esperantistoj jam aktive partoprenas kaj kontribuas al la traktado de nova teknologia realo.

Kiujn novajn defiojn portas neŭroretoj kaj AI al UEA kaj ĝenerale por la Esperanto-movado? Kio pri la moralaj, etikaj kaj aliaj demandoj? Ĉu ni povos integriĝi en tiun ĉi novan teknologian mondon kaj utiligi ĝiajn rimedojn por disvastigi nian lingvon? Ni vidos, kiel evoluos la afero, sekvos la novaĵojn kaj nepre informos vin pri ili.

Karaj legantoj, se vi estas fakuloj pri la neŭroretoj kaj AI, aŭ pri rilataj fakoj, vi povas sendi al ni viajn ideojn aŭ/kaj proponojn kiel trovi pli bonan lokon de Esperanto en la nova teknologia realo.

Tiun ĉi artikolon sekvas la intervjuo, kiun faris Anna Striganova al Martin Rue pri la uzo kaj influo de AI en Esperanto-literaturo, gravega ero de nia kulturo.

EVENTA SERVO

Eventa Servo estas retejo per kiu oni povas registri, listigi kaj diskonigi eventojn tutmonde.

Diskonigu esperantajn eventojn tutmonde

"Iusence, jes, ĝi spertas pri verkado en Esperanto"

Anna Striganova intervjuis Martin Rue pri Artefarita Intelektio en literaturo kaj aliaj specoj de arto. Fine de marto Martin prelegis pri tiu temo dum la Literatura Duonmaratono kaj vekis grandan intereson de la publiko pri tiu tre aktuala temo.

Anna Striganova: *Ĉu laŭ via opinio nuntempaj AI povas krei verkaĵon tiel, ke sperta leganto ne komprenu, ke la aŭtoro ne estas homo? Kaj se temas pri pentraĵo?*

Martin Rue: Mi komencu mian respondon per pensado pri alia demando: "kio estas verkaĵo?"

Se ni volas diri, ke verkaĵo povas esti io ajn skribita (kaj ne necese de homo), kaj ne estas limo pri mallongeco, tiam ni efektive diras, ke verkaĵo povas konsisti el nur kelkaj frazoj, eble nur unu alineo. Aliaflanke, eble ni volas argumenti ke verkaĵo devus esti io defia kaj devus havi minimuman longecon. Eble nur novelon ni akceptus kiel veran verkaĵon.

Kial gravas?

Se temas pri mallonga verkaĵo de kelkaj alineoj, eĉ paĝo, la kapablo de la nunaj AI-sistemoj ja atingis la punkton en kiu ĝi povas inventi koheran rakonton de tiu longeco. Se tamen temus pri, ekzemple, plena libro de 300 paĝoj, tiam aperas la truoj.

Kial?

AI-sistemoj (aŭ pli precize Grandaj Lingvaj Modeloj; angle: LLMs) funkcias kerne laŭ la koncepto de kunteksto. Ju pli da kunteksto (pro longeco), des pli defie estas teni la koherecon samkiel homa verkisto pene farus tra plena verkaĵo.

Simple: laŭ la nuna stato de AI-sistemoj, jes, ili ja kapablas skribi mallongan verkaĵon, kiu povus trompi spertan leganton pri la nehoma deveno. Samtempe, ju pli longa estas la verkaĵo, des pli evidenta estus la nehoma deveno. La kialo ĉefe temas pri la malforta kapablo ligi aferojn malproksimajn,

profunde kaj same kiel homa verkisto kapablas.

Se temus pri pentraĵo, mi emas jesi al la demando, ĉar en pentraĵo ne ekzistas la sama defio tiel, kiel mi klarigis pri teksto. Jam ekzistas abstraktaj artverkoj, kiuj estas malfacile kompreneblaj kaj ne necese devas montri koheron aŭ fakte ian ajn sencon de konsistenco. AI-sistemoj kiel Midjourney, DALL-E kaj Stable Diffusion jam kapablas krei tiaĵojn.

A.S.: *Ĉu AI bone spertas pri verkado ankau en Esperanto?*

M.R.: Helpos unue klarigi kiel funkcias AI-sistemoj por pli bone kompreni mian sekvontan respondon.

Sistemoj, kiel ekzemple GPT, fakte estas simpligita versio de la homa cerbo. Ili konsistas el neŭronoj (pli ol ekzistas en la homa cerbo), ligitaj kaj fortigitaj per trejnado pri iu fako, aŭ kaze de GPT4, vaste pri multaj diversaj fakoj. La celo, kaj sola kapablo de GPT estas "daŭrigi la tekston". Ekzemple: se vi komencus per la frazo "la rozoj estas ruĝaj, kaj la...", ene de la AI-cerbo ekzistus forta vojo de neŭronoj, kiuj kreus la rezulton (aŭ ion tre similan) "violetoj estas bluj".

Do al la demando.

Mi diras, ke ĝi scias nenion pri tio kiel esti verkisto, sed ĝi ja estas trejnita per tiom multe da datumoj pri tio, kiel aspektas la verkoj de verkistoj. Tiel, ĝi ja kapablas "daŭrigi la tekston" stile de verkoj, aŭ eĉ stile de iu ajn specifa verkisto mem.

Do jes, ĝi kapablas krei eligon, kiu ŝajnas tre simila al verko, sed ĝi ne estas verkisto.



Pri la parto de la demando kiu temas pri Esperanto, indas pensi pri trejnado. Oni trenas tiujn ĉi sistemojn, kiel jam dirite, per multege da datumoj en diversaj lingvoj. Kompreneble ekzistas multe pli da datumoj en la angla, la hispana ktp., ol en Esperanto. Tiel, la kapablo verki ion en la angla estas surbaze de pli fortaj ligoj inter neŭronoj ol en Esperanto, kaj do la rezultoj pli bonas.

Do iusence jes, ĝi spertas pri verkado en Esperanto, sed multe malpli ol en kelkaj aliaj lingvoj. "Sperto" ĉi tie temas pri la kapablo "daŭrigi la tekston" same kiel ĝi jam vidis en la trejndatumo, ne, ekzemple, sperto en pli profunda filozofia senco.

A.S.: *Kio laŭ vi distingas verkiston/pentriston-homon de verkanta AI?*

M.R.: Por mi, grava distingo estas la kreemo. GPT ne celas esti kreema. Ĝi

celas daŭrigi la tekston per la nuna kunteksto, kaj la algoritmo eĉ enhavas hazardecon, por ke la rezultoj ne ĉiam samu.

Tamen, homa verkisto/pentristo povas havi multajn celojn en sia verko. Eble oni volas esprimi sin mem per la kreaĵo, aŭ kapti ian signifan emocion en la laboro. Eble homo celas krei ion, kion oni neniam antaŭe vidis aŭ legis.

AI, male, kapablas nur uzi tion, kio jam ekzistas, por scii kiel "daŭrigi la

tekston", kaj por mi tio simple estas alia afero ol vera kreemo.

A.S.: *Ĉu povas verkisto, tradukisto, pentristo ktp. uzi AI kiel helpanton en sia laboro, aŭ li traktu AI kiel sian konkuranton?*

M.R.: Miaopinie ja estas valoro en AI-sistemoj, kaj ni uzu ilin por helpi nin. Pri longaj, pli ampleksaj klopodoj, AI-sistemoj mem ne anstataŭos tiujn, kiuj lernas kiel aldoni AI al sia vivo kaj ekuzi ĝin por plibonigi kaj kompletigi sian laboron.

Ni flankenmetu la problemojn, el kiuj nun ekzistas multaj, kaj memoru, ke ili jam estas vaste trejnitaj sistemoj, kiuj kapablas esplori ligojn freneze rapide inter multaj diversaj scieroj. Kiel ilo, ili simple estas, kaj eĉ pli estos, pli utilaj versioj de iloj, kiujn ni ofte jam uzas kiel Google, Wikipedia ktp.

Ke eblas interagi kun ili per homa lingvo, kaj ene, ke ili funkcias kiel cerbo (ne kiel serĉilo), ofertas al ni novajn avantaĝojn esplori kaj puŝi nin en pli da direktoj en nia propra laboro.

Solaj, AI-sistemoj estas preskaŭ senutilaj. Sed kun homa gvidisto, kiu kapablas forĵeti tion, decidi plu esplori ion alian, kaj paŝon post paŝo, funkci-

igi la etan (bone, egan) cerbon laŭcele, ekaperas tre utila kombinaĵo.

AI-sistemoj ne estas perfektaj, kaj neniam estos. Ĉiam gravas, ke homo decidadas, kio havas aŭ ne havas sencon laŭ iu celo kaj scio, kiu ofte estas nekonata al la AI-sistemo mem.

A.S.: *Ĉu talento bone interkomuniki kun AI laŭ vi iĝos (aŭ jam iĝis) nova branĉo de arto?*

M.R.: Jes, kaj ankaŭ iĝas nova laboro. Lerni kiel esplori tiom multe da ligitaj datumoj pere de homa lingvo jam estas granda defio. En la angla aperis titolo por tiuj, kiuj lerte povas fari tion, "prompt engineer" (prompta inĝeniero). Samtempe, AI-sistemoj senĉese ŝanĝiĝas kaj pliboniĝas, samkiel la manieroj instrui al AI sekvi novajn, pli interesajn, ne jam konatajn neŭrajn vojojn pri iu temo. En la fino, tiuj, kiuj plej bone komprenas eligi valorajn respondojn kaj ideojn, mem iĝos pli valoraj homoj kaj atingos avantaĝojn.

Jen fina konsileto: eĉ se grandan dubon vi nun havas, indas sekvi kiel evoluas tiuj ĉi sistemoj por ke vi restu preparita en via fako, kaze de subitaj pliboniĝoj, kiuj ekvenos eĉ pli rapide ol ili jam venas.



Oficiala Informilo

Al ĉiuj tre korean dankon! UEA



DUMVIVAJ MEMBROJ

Islando: R. Baldursson.
Pollando: E. Pruszyńska-Karbownik.

SOCIETO ZAMENHOF

Belgio: M.-L. Vanherk.
Finnlando: A. Harju.
Francio: J.-M. Cash.
Hispanio: J. Franquesa Solé.
Kanado: A. Blair.
Korea Resp.: So J.
Usono: D. Charters, A. Falk,

D.G. Grady, C. Lee,
B.A. Sherwood.

ALIANCO 365

Korea Resp.: So J.
Usono: D. Charters.

PATRONOJ de TEJO

Germanio: C. Brückner.
Hispanio: S. Vives i Gómez.
Italio: U. Pensabene.
Pollando: E. Pruszyńska-Karbownik.
Usono: D. Charters,
D.G. Grady,

DONACOJ

ĝis la 5-a de aprilo 2023

Amsterdama Katedralo pri Interlingvistiko kaj Esperanto

Nederlando: H. Adriaanse
1000,00; Esperanto
Nederland 250,00.
Sumo ĉi-jara: 1850,00.

Fondaĵo Afriko

Japanio: Inada M. 25,03.
Por la UK en Arusha (Tanzanio):
Nederlando: P. Coppens 5000,00.
Sumo ĉi-jara: 5286,23.

Fondaĵo Azio

Japanio: Kawamoto H.,
Kunii H., Nakamiti T. - po 18,08.
Sumo ĉi-jara: 263,10.

Fondaĵo Canuto

Luksemburgo: I. Ertl 20,00.
Nederlando: R. Moerbeek 25,00.
Rumanio: J. Nagy 72,00.
Sumo ĉi-jara: 682,49.

Konto Informado

Ĉiuj por "Bienalo Rio":
Francio: D. Loison 10,00.
Germanio: F. Maurelli 20,00.
Japanio: Syôzi N. 500,00.
Nederlando: R. Moerbeek 40,00.
Usono: G. Boudreaux 25,00.
Sumo ĉi-jara: 595,00.

Ĝenerala Kaso

Germanio: C. Frank 35,00;
A. Nonima 888,76.
Div. malgrandaj: 17,00.
Alianco 365: 885,00.
Sumo ĉi-jara: 5747,89.

Strategia planado — survoje al la enketilo

■ Duncan Charters

En la pasintaj numeroj de nia revuo, vi povis konsciiĝi pri la elementoj de la laborplanoj, kiujn evoluigas nia komunumo por plifortigi sian estontan progreson. En la marta numero, mi direktis nin al nia misio kaj vizio, aŭ celdeklaro, al la formato de nia laborplano, kaj al la paŝoj kiujn prenis TEJO en sia planado (paĝoj 64-65). En la artikolo de nia Ĝenerala Sekretario kaj estrarano Aleks Kadar, vi povis legi la laborplanojn de niaj kontinentaj komisionoj (60-62). En raporto de nia nova estrarano François Lo Jacomo, vi povis legi pri unu aspekto de lia laborkampoj, Aktiva partnereco kun Unesko (63); kaj ankaŭ de du eksprezidantoj de UEA informartikolon kun agadpropono por plifortigi niajn rilatojn kun internaciaj institucioj (56). Deflanke de TEJO, priskribon de *Vortoj*, luda lingvolerna programo kiel kontribuo de esperantistoj al multlingveco, realigebla pro subvencio de la Eŭrop-Komisiona programo Erasmus+.


TEJO ĵus anoncis kun detaloj alian gravan subvencion de la sama instanco kun la celo interalie plifortigi niajn administrajn kapablojn, kaj UEA same ricevos subtenon dank' al la fortostreĉoj de Kosmo Strategio, kun kiu ni kontrakte laboras tiucele. Sekvos pli da detaloj, sed nia sukceso dependos de aktiva kunlaborado de multaj el ni por realigo de la planoj laŭ la kondiĉoj de tiuj subvencioj. Tiu apogo venas en precize la ĝusta momento, kiam en la nuna transira epoko ni devas rekoncepti niajn administradon, organizadon kaj interagadon kun nia membraro kaj la mondo. Por la Estraro de UEA, kaj ankaŭ por niaj membroj, tiuj koincidoj estas ĝojigaj, ĉar ili montras ke nia laboro pere de Esperanto vivigas niajn idealojn kaj pro tio allogas la subtenon de eksteraj instancoj. Tiuj serioze ekza-

menas proponojn kaj daŭre subtenas nin nur pro nia konstatebla atingo de reciprokaj celoj kiuj montras ke ni ne nur zorgas pri niaj internaj planoj kaj deziroj, sed pri la pli vastaj celoj de transnacia kaj transkultura kunlaboro laŭ komunaj idealoj.

En la aprila numero de la revuo vi povis legi pri la strategia laborplano de ILEI (paĝoj 78-79), kaj tre gravas la klarigo de ILEI-prezidanto Ahmad Mamduhi ke “la plejmulto de la laborplaneroj estas por antaŭenigo de la tuta Movado”. Tio montras la pli intensan kunlaboron kiun ni iniciatis inter UEA, ILEI, kaj TEJO, kio jam montriĝis en nia kunpensado kaj kunlaboro pri niaj Kongresoj italaj kaj afrikaj. Tiu 38-ara laborplano, aranĝita en ses grupojn, estas konciza (ne multe pli ol unu paĝo), klara kaj absolute realigebla, surbaze de forumoj, kiuj ellaboros la vojon al atingo

de tiuj celoj per kunlaboro inter asocioj, grupoj, konatoj kaj individuoj. Precize tiel ni intencas organizi la agadon de UEA, por ke nia progreso ne dependu nur de supersarĝitaj Estraro kaj Ĝenerala Direktoro. Tiu tuta aprila numero de nia revuo estas bela ekzemplo de kuniĝo de raportoj pri agado, kiu plifortigas nian internan komunumon, samtempe rilatigante ĝin kun eksteraj kontaktoj, celantaj helpi nian mondon per kunlaboro kun aliaj, kiuj pro nia agado havos la okazon konatiĝi kun la avantaĝoj kiujn proponas Esperanto por tutmonda interkompreniĝo kaj paciga progreso.

En lastatempa konversacio kiun mi partoprenis, diskutiĝis la daŭripovo de UEA kiel kerna faktoro en nia planado. De kio dependas tiu daŭripovo? Laŭ almenaŭ unu sociologia studo, la ĉefa karakterizilo de nia komunumo estas ĝia diverseco. Ne surprize, ĉar ĝi inkluzivas individuojn de originoj kiuj reprezentas, kvankam ne egalproporcie, grandan parton de la vivperspektivoj, kulturoj, etnoj, nacioj, poli-



La bildo estis kreita de neŭroreto Midjourney

tikaj tendencoj, kredoj kaj opinioj troveblaj en nia hodiaŭa mondo. Lernintoj de Esperanto varias de poliglotoj al individuoj kiuj neniam sukcesis lerni eĉ unu alian lingvon aldone al la denaska, kaj ties perspektivoj estas influataj de la propraj spertoj. Eĉ la uzo kaj difino de terminoj kiel “komunumo”, “movado” aŭ “popolo” povas naski disputojn. Ne surprizas la fakto ke preskaŭ ĉiuj sociologiaj esploroj pri UEA aŭ “la Esperanto-movado” ĝenerale reliefigas bazajn kontraŭdirajn alirojn kiuj ekzistis ekde tre frue en la historio de Esperanto. Kiam konsciante foje batalemajn kverelojn inter “samideanoj” ni lamentas la ŝajnan nekaptablon de la esperantistaro vivi siajn idealojn de harmonia interagado kaj pacema kunvivado, ni devas unue konscii la kialojn kaj la defiojn antaŭ ol nur plendi kaj rezigni. Nur post tiu konsciigo ni kapablos celi la solvon. Precize tiuj kontraŭdiroj havis negativajn sekvojn por harmonia kunlaborado en la realigo de komunaj celoj. Inter tiaj parencaj kontraŭdiroj oni povas konstati:

1. Pure komunikan aliron al la rolo de Esperanto *kontraŭ* kulturportaj kaj sociŝanĝaj celoj.
2. Orientiĝon al sociaj ŝanĝoj *kontraŭ* oficialigo de Esperanto per influo al “sicipolitikaj elitoj”.
3. Neŭtralan prezenton de la lingvo sen kultura, ideologia balasto *kontraŭ* vasthorizontaj celoj.
4. La kliŝe malnovan disigilon: “finvenkismo” *kontraŭ* “raŭmismo” (ĉu kadukiĝantan aŭ ne?).
5. La flegadon kaj plifortigon de nia interna kultura komunumo *kontraŭ* malfermiĝo al ekstero.
6. La provizon de servoj al jamaj esperantistoj *kontraŭ* efika informado, varbado, instruado.
7. “Neŭtralecon” de UEA kiel tuta neengaĝiĝo *kontraŭ* denunco de ĉia politika perfortemo.
8. “Universalismon” (homara unuigo) *kontraŭ* “partikularismo” (perado inter nacioj kaj etnoj).
9. Insiston pri la praveco de siaj konkludoj *kontraŭ* “antaŭjuĝoj” kondukantaj al aliaj konkludoj.
10. Neutilon de interkultura konsciigo *kontraŭ* kredo ke tiu manko subfosas niajn klopodojn.

Ĉu ni restu blindaj al la kialoj de internaj konfliktoj? Eble la plej subtila kaj psikologie potenca dividilo devenas de tio ke nia estas idealisma movado kies celoj ne realiĝas en unu generacio. Individuoj, kiuj investis signifan parton de sia vivo, nature deziras vidi tiun efektiviĝon, aŭ minimume progreson, en sia vivdaŭro. Ne memkonscia homa naturo emas batali kontraŭ tiuj kiuj ne dividas persone akceptitan recepton por progresigi, “venkigi”, la ideon de Esperanto. Fine, la imagbildo pri kio estas, aŭ estu la Esperanto-komunumo (se oni akceptas ke tio ekzistas), estas notinde diversaj.



Mi atentigis antaŭe ke d-ro Zamenhof estis firme konvinkita ke nenio malhelpas la finan akcepton de Esperanto KROM kverelado inter la esperantistoj. Antaŭa UEA-prezidanto Ivo Lapenna firme kredis ke la logiko de Esperanto kiel bezonata, jam elprovita rimedo por plej efika translingva kaj transnacia komunikado sufiĉas por garantii ĝian finan akcepton. Claude Piron simile kredis ke la ideo de Esperanto estas tiom bona, ke iam ĝi devos venki. Mia bazlerneja lernejestro iam komunikis al ni en duonminuto, ke ni bezonas internacian lingvon, ĝi ekzistas, ĝia nomo estas Esperanto, sed la esperantistoj nenion faras por progresigi ĝin. Se ni tute aŭ parte kredas tiujn konkludojn, ĉu nia plej efika strategia plano estus ne malhelpi tiun rezulton direktante nin unuavice al vera unueco inter la laborantoj por Esperanto? Ĉu aliaj asocioj kaj grupoj atin-

gis tion? Efektive jes, kvankam escepte. Kio necesas? Nenio neatingebla, se ni komprenas la spiriton de nia lingvo kaj se ni ne seniluziiĝis pri la inteligento de la homaro kaj ĝiaj plej altaj idealoj. Esenca paŝo estas, ke ni individue kaj grupe akceptu tiun diversecon kiun ni agnoskas, kaj subtenu same kiel niajn proprajn ideojn tiujn de niaj kunpiligantoj, kiuj sincere kaj celkonscie elektas tute alian vojon por atingi nian komunan celon. Se ni flegas nian literaturan kulturon per legado kaj verkado, ĉar nur tio estas signifa por ni, ni ĝoju ke aliaj elektas malfermajn kontaktojn kun la publiko kiel ĉefan agadon: kaj inverse! Kaj se ni deziras levi demandojn ekzemple pri nia agado ĉe UN kaj Unesko, ni tion faru, sed bonkore, informiĝeme, kunpenseme. Estas facile kompreni kaj ameme interagi kun personoj, kiuj samopinias kun ni. Tio ne estas la tasko por kiu kreiĝis Esperanto. La tasko estas strebi por kompreni kaj ameme interagi kun personoj kiuj malsamopinias kun ni pro tute aliaj spertoj, aŭ ŝajnas agi en direkto tute kontraŭa al nia perspektivo. Provi vidi iliajn bonajn motivojn. Gratuli kaj ĝoji pri ilia agado. Labori por maksimume forigi niajn antaŭjuĝojn kontraŭ ĉio kulture, etne, kredare malsama, eĉ ofenda al ni. Tio ne signifas ŝanĝi nian sinceran moralan perspektivon kaj tion komuniki kiam necesas, sed ni restu ĉiam malfermitaj al tiuj de aliaj kunhomoj, kiuj akceptis la valoron de nia lingvo kaj la respondecon agi en kunlaboro kun aliaj, kiuj alprenis la saman premison.

La diverseco de juĝkriterioj de membroj de UEA montriĝis klare en sociologia esploro realigita de la Socioscienca Esperanto-Grupo (SEG) dum la Universala Kongreso en Bjalistoko en 2009. La rezultoj konfirmis la konkludojn de tri sendependaj studoj faritaj aŭ publikigitaj en 1991. Eckhard Woite, en sia studo *Organizo kaj efiko de la Esperanto-movado*, skribis pri la “diabla cirklo” kiu frontas ĉiujn internaciemajn organizaĵojn: ili fondiĝis por influi la eksteran mondon, kaj fine okupiĝis ĉefe por servi la interesojn de la membroj. Tiu kritiko de UEA leviĝis konstante tra nia historio. Ni havas nun la ŝancon rompi tiun diablan cir-

klon, ĉar sen la koncentriĝo de niaj fortoj kaj financaj rimedoj al subteno de la Centra Oficejo, ni povas utiligi niajn plej grandajn talentojn, kie ajn en la mondo ili troviĝas, por fokusiĝi pri niaj veraj celoj: informado kaj instruado de Esperanto, kaj flegado de kontaktoj kiuj forigos antaŭjuĝojn kontraŭ nia lingvo kaj movado kaj nature allogos publikon kiu komprenos ke Esperanto plivastigos la horizontojn de la jam deciditaj propraj intereso. Multaj asocioj liberiĝis de kostaj centroj kaj malnovaj administraj metodoj, plene profitante la avantaĝojn de la teknologio kaj ko-

munikado en nia hodiaŭa mondo. Ĉu UEA estos sufiĉe aŭdace progresema por ilin sekvi?

Ankaŭ en 1991, ne publikigita esploro de UEA, interna inter ĝiaj membroj, celis malkovri opiniojn pri la kvalito de la servoj de UEA kaj la efikeco de ilia funkciado, celanta konsciigi pri la bezonoj kaj deziroj de la membraro. Tion aparte celas nia enketilo, en la kunteksto kiun mi detalas.

Kiel mi anoncis en antaŭaj artikoloj, UEA planas sendi ne nur al ĉiuj membroj, sed al la Esperanto-uzanta komunumo ĝenerale, demandaron por

sondi la opiniojn de nia nuna publiko pri la vojo antaŭen por la pli vasta akcepto kaj utiligo de Esperanto. Nia fokuso estos pli efika rolo por la Universala Esperanto-Asocio, en maksimuma kunlaboro kun aliaj asocioj kaj grupoj, ĉu formale ligitaj al UEA aŭ ne. La rezultoj de tiu enketilo estos publikaj, kaj unue prezentataj dum la Universala Kongreso en Torino. Se vi havas ideon pri nepre necesaj demandoj por nia enketilo, mi volonte ricevos, sed rapidu, ĉar ni celas la finon de aprilo aŭ komencon de majo por ĝia distribuo.

Faka agado

Projekto Verden en fina fazo

■ Ladislav Kovář

En la jaro 2022 estis de eŭropaj instancoj aprobita projekto pri daŭripoveco kaj transporto, subtenata per fonduso Erasmus+ de Eŭropa Unio en kategorio KA2 – kunlaboro inter eŭropaj organizoj. La celo de la projekto estas subteni tiun kunlaboron kun fokusiĝo al fervoja transporto. Akceptante de la subteno estas UEA, partneroj estas Ĉeĥa Fervojista Esperanta Asocio (ĈFEA), Franca Esperanta Fervojista Asocio, Esperanto-klubo Parma, Flandra Esperanto-Ligo, Biciklista Esperantista Movado Internacia kaj Internacia Fervojista Esperanta Federacio (IFEFF). Administranto de la projekto estas la firmao Kosmo Strategio.

Komence de la monato marto, inter la 4-a kaj 7-a, okazis en Pardubice (Ĉeĥio) jam kvara kunveno de la partoprenantoj por diskuti pri la enhavo

kaj formo de la preparata broŝuro kun la rezultoj de la projekto. Krom tio oni traktis organizadon de la lastaj kunvenoj de la projekto, kiuj okazos dum majo en Antverpeno kadre de la 74-a IFEFF-kongreso kaj fina prezento de la projekto en julio dum la 108-a Universala Kongreso en Torino.

Kadre de la projekto-kunveno okazis jam 3-a seminario kun la temo: "Eŭropaj fervojoj: daŭripova fervojtransporto", kiun organizis ĈFEA kunlabore kun la Universitato Pardubice. La organizanto de la seminario Jaroslav Matuška invitis kvin prelegantojn, kiuj parolis pri aferoj tuŝantaj la temon de la Verden-projekto. Rodika Todor, prezidantino de IFEFF, prezentis perrete la projekton kaj ĝiajn celojn, Lars Sözüer parolis pri biciklotransportado en trajnoj kaj interrilataj problemoj, Vito Tornillo prezentis aspektojn de intermodala transportado. Roman Štěrba



parolis pri strategio de daŭripoveco, kiun preparis la ĉeĥa Fervojadministracio kaj je la fino prezentis sian kontribuon Francesco Maurelli kun la temo Robotiko kaj daŭripoveco.

La seminarion partoprenis 70 intereso, el kiuj 34 perrete (el 13 landoj). Inter la ĉeestantoj estis ankaŭ profesoroj el la Universitato Pardubice kaj 15 studentoj. La aranĝo de la seminario kontribuis ankaŭ al la 30-jara datreveno de la fondo de la Transporta Fakultato de Jan Perner – parto de la Universitato Pardubice.

Proponu kontribuojn por la Kleriga Lundo de la 108-a UK en Torino 2023

Aldone al la Internacia Kongresa Universitato kaj Scienca Kafejo, eblas proponi kontribuojn ankaŭ por la Kleriga Lundo (okazonta la 1-an de aŭgusto 2023). La Kleriga Lundo celas ne nur informi al kongresanoj pri diversaj temoj, sed ankaŭ doni al ili okazon praktiki kaj vivsperti pri traktataj temoj. Pro tio la programo kutime ligiĝas al ateleroj kaj metiejoj.

La diversajn aktivecojn, kiuj konsistigas la Klerigan Lundo, povas gvidi ĉiuj homoj el la Esperanto-komunumo pretaj dividi spertojn kaj sciojn, tiel ke speciala celo de tiu programo ankaŭ estas krei ligon inter esperantistoj per sciodivido kaj kunvivado. Se vi interesiĝas kaj volas ion proponi, skribu al la Estraro de UEA, per gk@aco.uea.org, ĝis la 15-a de majo 2023.

Por impresiĝi de la temoj kaj nivelo de la Kleriga Lundo eblas vidi ĝian programon dum la UK 2022 Montrealo en la pasintjara Kongresa Libro (p.42) kaj en la retejo de UEA: <https://mallonge.net/yq>. Por aliĝi al la 108-a UK uzu la retan aliĝilon: <https://uk.esperanto.net/2023/>. Jam aliĝis preskaŭ 1000 homoj el 58 landoj! Ni rekomendas al kongresaliĝintoj aliĝi al grupo de UK en Telegramo: <https://uk.telegram.org/>. Ĉis la revido en Torino!



Internacia Virina Tago

■ S-ino Raveloharison Miora, Afrika Komisionano, respondeculino pri virinoj kaj kulturo, Prezidantino de EVAA

Okaze de la internacia tago de virinoj EVAA (Esperantista Virina Asocio en Afriko) organizis manifestacion kun sukceso. Ni pensas ke la tago de la 8-a de marto estas ne nur festo de virinoj sed ankaŭ okazo por montri solidarecon kaj pretecon respondi kaj labori.

Jen estas la temoj debatitaj dum tiu evento:

Instruado de la teknologio al virinoj, edukado de la infanoj kaj povigo de virinoj. Ni opinias ke tiuj tri temoj garantias la daŭripovan disvolvon postulan de la nuna epoko.

La manifestacio aperis sub tri formoj:

Dimanĉe, la 5-an de marto, okazis la virina konferenco en Kinŝaso, kiu debatis pri la instruado de la nova teknologio al virinoj por batali kontraŭ la analfabeteco. La ĉeestantoj decidis ke la diskuto pri tiu temo pilargiĝos kaj estos daŭrigata fine de marto.

Merkredon, la 8-an de marto, Antananarivo, Madagaskaro, akceptis renkontiĝon. La virinoj debatis pri la maniero eduki filinojn. Tio signifas ke la

bona edukado al niaj filinoj garantias la estontecon de la nacio. La ĉeestantoj diskutis ankaŭ pri povigo de virinoj. Povigo de virinoj kontribuas al daŭripova disvolvo de ĉiu unuopulo, de ĉiu familio, de la socio kaj de la nacio. Virino havas apartan kapablecon kaj se ŝi estas provizita per trejnado kaj materialoj kaj morale apogita, ŝi iĝas granda subtenanto por siaj ĉirkaŭuloj.

En merkredo, la 8-a de marto, vespere okazis retkunveno, en kiu 19 homoj partoprenis. Estis reprezentantoj de afrikaj kaj eŭropaj landoj. Ankaŭ viroj partoprenis kun virinoj tiun retkunvenon. Agrabla estis la etoso kaj ni reprenis la suprecititajn temojn dum la diskutado.

Ni sincere dankas la jenajn prelegintojn:

1) «Virinoj devas lerni novajn teknologiojn por batali kontraŭ analfabeteco». Ĉeftemis la interveno de Alexandrine Omba el Kinŝaso, DR Kongo. Ŝi parolis pri la difino de tiu lernado de iloj kaj teknikoj laŭ la celoj. Teknologio ebligas malkovri multajn aferojn, ekzemple komercon, vojaĝadon, lernadon ktp.

2) «Edukado de knabinoj» gvidis Ranja Lydie Zafinifotsy de Antananarivo, Madagaskaro. Ŝi parolis pri la komunaj problemoj en Afriko kaj proponis solvojn kiel la kuraĝiga sen-

dependeco, memsolvi problemojn kaj resti forta, akompani la knabinojn.

3) Pri «Povigo de virinoj» prelegis Fafah Rafanomezantsoa de Moramanga, Madagaskaro. Troveblis en tiu prelego la respondoj al la jenaj demandoj: Kial povigi virinojn? Kiu povas, devas povigi virinojn? Kion ni povas fari por povigi virinojn?

La celo ja ne estas marĝenigi la virojn aŭ konkurenci kun ili, sed por kuraĝigi nin, por ke la virino kuraĝu stari kaj preni sian respondecon. Virino, kiu enmanigas al si la edukadon de siaj filinoj por ke tiuj ĉi estu bonaj civitanoj, taŭge trejnitaj komforme al la teknologia progreso kaj havu dignan laboron.

Tiu retkunveno plenumiĝis sub la gvidado de sinjorino Raveloharison Miora. Alvokon mi faras por resumi ĉion:

«Havigu taŭgan edukadon al filinoj same kiel vi faras al viaj filoj, ĉar eduki filinojn estas eduki nacion. Virino havas kapablecon, ŝi estas garantio de disvolvo pro tio, ke ŝi prizorgas la edukadon de homo ekde sia ventro ĝis la aŭtonomeco de ŝia infan(in)o. Sekve, povigo de virino estas energifonto por helpi ŝin plenumi sian taskon. Necesas trejniĝi, lerni eĉ la novajn teknologiojn por helpi sin varti kaj eduki sian idaron. Se bonas la fruktoj de la idaro, tiu ĉi iĝas progresemuloj kaj bonaj civitanoj por la nacio.»

Laŭlum, en nia memoro

Yu Jianchao

La 29-an de marto estas la 100-jara datreveno de la naskiĝo de sinjoro Li Shijun, elstara ĉina movadisto, kun la Esperanta nomo Laŭlum.

Laŭlum naskiĝis en vilaĝo de norda Ĉinio, kaj infanece pro la milito fuĝis al suda Ĉinio por viziti lernejon. Fininte la mezlernejon, li laboris kiel telekomunika interpretisto kaj provleganto por ĵurnalo. Poste li instruis en mezlernejo kaj esperantistiĝis en la jaro 1940 en Chongqing, Sichuan-provinco. En 1946 li aliĝis al Chengdu-a Esperanto-Asocio kaj estis ĝia sekretario, samjare li membriĝis en Tutmonda Asocio de Esperantistaj Ĵurnalistoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio li eklaboris por Ĉina Esperanto-Ligo kaj la gazeto *El Popola Ĉinio*, kies vicĉefredaktoro li estis ĝis emeritiĝo. Krome li laboris ankaŭ kiel vicĉefredaktoro de Ĉina Esperanto-Eldonejo kaj de *La Mondo*, la organo de ĈEL. Post emeritiĝo en la komenco de la 90-aj jaroj, li daŭrigis la aferon per sia diligenteco kaj abundego da fruktoj por Esperantaj traduko, verkado kaj instruado, li starigis monumenton por la ĉina Esperanto-Movado. La 10-an de novembro 2012 Laŭlum mortis 89-jara.

Li mem diris, ke li dum la vivo faris nur unu aferon: okupiĝis pri Esperanto.


Laŭlum esperantigis multajn ĉinajn literaturaĵojn, inter amaso da ili

plej gravaj estas tri el la kvar ĉinaj klasikaj verkoj: *Ĉe Akvorando* (2004), *Romano pri la Tri Regnoj* (2008) kaj *Pilgrimado al la Okcidento* (2009). Ili ĉiuj troviĝas en la listo de Serio Oriento-Okcidento. Por la kvara, *Ruĝdoma Sonĝo*, esperantigita de Xie Yuming (Seimin), Laŭlum faris reviziadon.

Laŭlum verkis lernolibrojn ĉefe por ĉinoj. Plejlaste en lia vivo eldoniĝis la internacie uzebla *Esperanta Vortaro por Lernantoj*. Jam frue en la 60-aj jaroj pasintjarcente eldoniĝis liaj lernolibroj por komencantoj, libro pri gramatiko, libro pri konversacio kaj en la 80-aj jaroj eldoniĝis pliaj, kiel *Esperanto-kurso por memlernado* (I, II 1984). En 1988 aperis lernolibro por komencantoj *Esperanto*, kiu fakte sekvis la televidan serion *Espero* faritan de Qingdao-a televida stacio. En 1986 aperis de li kompilita kantararo *Kantu! Kantu!* Kaj multaj aliaj eldonoj.

Kiam li estis (dufoje) invitita por instrui Esperanton en la Ĉina Komunikada Universitato, li ankaŭ kompilis lekciajn materialojn *Kurso pri la traduka arto de Esperanto* kaj *Promeno tra l'Esperanta literaturo*, krom la bazaj lernolibroj.

Li viglis en diversaj aranĝoj kaj ĉie postlasis sian sonon. En 1986 en la 71-a UK li faris la raporton pri ĉinaj kanzonoj. En 1987 li partoprenis en la 72-a UK en Varsovio, Pollando por celebri la centjariĝon de Esperanto kaj faris ĉefteman paroladon. Post la kongreso li laŭinvite ĉeestis en la Esperanta Internacia Festivalo en Zagrebo, Jugoslavio, kaj rolis kiel lingva juĝisto de ĝia Pupteatra Festivalo. En 1993 li estis prezidanto de la konferenca universitato de la 5-a Azi-Pacifika Konferenco de Esperanto en Qingdao. En 1995 dum vizito al Japanio por la konferenco de la unujariĝo de la Esperanta Domo, li pretere vizitis Tokion kaj aliajn 14 urbojn, interalie Osaka, Nagoya, Nara, kaj faris serion da prelegoj, kiuj temis pri ĉinaj poemoj, la ĉina Esperantomovado, lingvaj problemoj k.a. En 1996 li prezidis la kongresan universitaton de la 1-a Azia Kongreso de Esperanto



en Ŝanhajo. En 2004, kiam Pekino gastigis la 89-an Universalan Kongreson de Esperanto, li servis denove kiel rektoro de la IKU, kaj faris akademian raporton pri la evoluo de Esperanto. En 2005, li faris raportojn pri Esperanta literaturo kaj ĉina literaturo en la 58-a Nordamerika Esperanta Kongreso.

En 2005 li gajnis la premion en la konkurso de la kanto-kreado de la Nordamerika Esperanto-Kongreso en Austino, Usono. En 2006 li partoprenis en la Beletro-konkurso de la 91-a UK (Florenco, Italio), kaj gajnis honoran premion pro sia kontribuita unuakta teatraĵo *Cigno*.

Laŭlum estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto en 1983, kaj reelektiĝis en 1992, 2001 kaj 2010. En 2003 li ricevis la Premion Grabowski. En 2004 li fariĝis Honora Membro de UEA. En 2010 la Ĉina Tradukista Asocio honoris lin per Dumviva Honora Premio pri Tradukado, kaj en 2011 Ĉina Esperanto-Ligo per Dumviva Honora Premio.

Mi atestis lian instruitecon – estinte unu el liaj studentoj dum la jaroj 1989-1991, kiam li faris instruadon en la tiam Beijing-Disaŭdiga Instituto. Mi diru, ke li meritas esti Honora Membro de ILEI, distingita en la 45-a Konferenco, Kunming, 2012. Tiam mi sidis inter la aplaŭdantaj komitatanoj.

Laŭlum kuraĝigis min per senhezita donaco de la poemaro *Elpafu la*






Sagon, kiam li eksciis, ke mi ekprenis esploron pri Tibor Sekelj. Ilia interdiskutado pri neologismoj en la formoj de recenzoj kaj eseoj sinsekve aperis en la revuo EPĈ en la 80-aj kaj 90-aj jaroj. De tiuj elokventaj artikoloj komenciĝis mia esplorado.

Du tagojn antaŭ lia forpaso, ni faris babildon ĉe lia klinika lito. Parolante pri sia instruado en superaj lernejoj, li unuafoje malkaŝis sian maltrankvilon, ke li ne rajtus instrui studentojn, ĉar li mem eĉ ne havis ŝancon viziti ian ajn altlernejon. Sed mi rakontis mian travivaĵon dum mia vojaĝo en Hungario: kiam mi parolis kun amikoj pri Laŭlum, ĉiu konas la nomon; se mi diras, ke mi estas studento de Laŭlum, ĉiuj ĵetis al mi rigardon kun admiro. Mi sciis, ke la admiron donis ili fakte al la estimata Laŭlum. Aŭdinte tion, li mienis tenere kaj ridetis elkore. Mi deziris, ke mia rakonto forviŝu lian maltrankvilon kaj donu ion trankvilan en lia koro. Estis la lasta trankviligo.

La 5-a de aprilo venas kiel la tago Klara kaj Brila, ĉina tradicia festo por omaĝi forpasintojn. Por la estimata Laŭlum, nun streĉe iras la provlego de la supre menciitaj porstudentaj libroj *Kurso pri la traduka arto de Esperanto* kaj *Promeno tra l'Esperanta literaturo*, kiujn aperigos la eldonejo Sinolingua sub la Ĉina Fremdlingva Publikiga Admi-



nistracio. Des pli Ĉina Filio de ILEI deziras aperigi memoran kolekton en la kuranta jaro, por ke ĝi estu eterna motivaĵo por nia Movado.

Bonvenaj estas viaj kontribuajoj omaĝe al Laŭlum, temas pri movado, instruado, verkado, tradukado ktp. Eseo, recenzo, rakontado, poemo kaj prozo, ne limiĝas la stiloj. La limdato estas la 30-a de junio 2023, jen kiel povas atingi via sendo je ĉiu el la adresoj triope: arko.gong@qq.com, 458916867@qq.com, skzjyujianchao@sina.cn.



Se vi deziras konatiĝi kun ĉefverkoj de diversaj naciaj kulturoj, legu la librojn en la Serio Oriento-Okcidento.

Vidu liston ĉe:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Serio_Oriento-Okcidento

79-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: edukado, sporto kaj suno por ĉiuj generacioj

■ Albert Stalin Garrido,
Prezidanto kaj Estrarano
pri Kongresoj de TEJO

Haltu, leganto! Bonvolu respondi ĉi tiun etan enketilon. Ĉu:

- vi estas aŭ estis membro de TEJO, neniam spertis la plej grandan junularan Esperanto-eventon de la jaro aŭ sopiras denove sperti ĝin;
- plaĉus al vi pasigi agrable varman someron sur plaĝo de ora sablo;
- vi deziras malstreĉiĝi kaj fizike ekzerciĝi en tutsemajne haveblaj olimpik-nivele ekipitaj spacoj por diversaj sportoj aŭ en trankvila, verda pinarbaro;
- vi volas ricevi ĉiutagan provizon de aŭtentikaj (nord)italaj manĝaĵoj;
- interesus vin vidi junajn talentulojn en nova originala esperantlingva muzikalo; aŭ
- vi estas Esperanto-instruisto, de ajna aĝo, kiu estas malfermita al kunlaboro kun aliaj E-instruistoj de ĉiuj aĝoj kaj ŝatus aŭskulti la voĉon de la junularo en la plibonigo de Esperanto-edukado por la nuntempa kaj la venontaj generacioj de lernantoj?

Ĉu hazarde via respondo estis "JES!" al unu, kelkaj, aŭ eĉ ĉiuj el la de-



mandoj? En tiu okazo ni povas doni al vi nur unu konkludon: vi povos sperti ĉion tion, sed nur kondiĉe ke vi rapide aliĝu al la **79-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO**, kiu okazos komune kun la 56-a ILEI-Kongreso en Lignano Sabbiadoro, Italio, de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2023.

La 79-a IJK de TEJO, aŭ #IJK2023 kiel ni karese nomas ĝin, debutas sub nova sistemo de IJK-organizado inaŭgurita de TEJO en 2022: ĝin organizas la internacia Kongresa Komisiono (KK) el aktivuloj el pluraj landoj, kiuj pretigas ĝian efektivan enhavon kun la konstanta subteno de loka kongresa teamo. Tiel, vi povas certigi, ke la Programo estos bunta, inkluziva kaj nasita el vera interkultura kunlaboro.

La IJK okazos en Lignano Sabbiadoro, ĉarma marborda urbeto, kiu situas en nordorienta Italio, inter Venetio kaj Triesto (al kiuj ni cetere ofertas tuttagajn ekskursojn). La urbeto fieras pri siaj pluraj kilometroj da plaĝoj kaj estas tre populara loko en la somero. Tamen, ni ne planas kongresi sur iu hazarda plaĝo: ni troviĝos en Bella Italia Efa Village, feria kaj sporta vilaĝo, kiu ne nur havas privatan plaĝon, sed ankaŭ olimpikan naĝejon, akvoparkon,

futbalajn kampojn, vastajn pinarbaron kaj herbejon, kaj praktike ĉion, kion vi bezonos por sanige movi vian korpon kaj plene ĝui la naturon – tute sen aldona kosto. Do, ni invitas vin, ke ne nur vin mem vi venigu al Lignano, sed ankaŭ vian tutan familion.

Kun la ĉeftemo: **"Intergeneracia kunlaboro por edukado"**, la IJK dediĉas sin kiel spacon, en kiu malsamaj generacioj de esperantistoj povos rekte interagi unu kun la alia por diskuti pri la nuntempo kaj estonteco de Esperanto-edukado. Ni scias, ke en la moderna epoko ekzistas novaj metodoj kaj rimedoj por lern(ig)i la lingvon (kelkajn el kiuj naskis la kronviroza pandemio), sed ni ankaŭ vidas, ke estas relative malmultaj junaj E-instruistoj. Dum la komunaj kongresoj ni celas aŭdigi la voĉon de junuloj, kiuj ŝatus kontribui al la transformo de E-instruado, kaj samtempe spertigi junulojn, kiuj deziras rekte lerni el spertuloj por mem kapabli disvastigi nian lingvon per bonkvalita, efika instruado.

Aliaj aferoj, je kiuj vi povas kalkuli dum la IJK:

- Buntaj prelegoj, atelieroj, filmoj kaj diskutrondoj;



- Amuzaj vesperaj kaj noktaj programeroj interne aŭ surplaĝe (Trin-

komanĝa Nokto, Itala Vespero, Internacia Vespero, Muzikalo kaj koncertoj);

- Sporta Tago kaj Plaĝotago; kaj kiel kutime, niaj ĉefaj movadaj programeroj: Junulara Movada Foiro, diversaj atelieroj kaj kunsidoj de la komisionoj de TEJO, kaj la Malferma Horo de la TEJO-Estraro.

Ĉu vi ŝatus kontribui al la Taga Programo de la IJK? Vi povas! Ne heditu submeti vian proponon per *mallonge.net/ijk2023-programero*.

Ne estas ofte, ke la kongresoj de la tri grandaj organizoj okazas ekzakte en la sama lando, kaj partopreni ĉiujn tri estus granda atingo en la persona "kontrollisto" de ĉiu esperantisto. Ti-

on plifaciligos la fakto, ke aliĝinte al la IJK vi libere povos partopreni en la programo de la ILEI-Kongreso laŭ via plaĉo. Profitu do de la ŝanco, ke la IJK kaj la ILEI-Kongreso okazos tuj post la 108-a Universala Kongreso (UK) en Torino, de kiu vi disponos pri rekta busa karavano aŭ aliaj transirebloj.

Legu ĉiujn informojn kaj aliĝu tuj ĉe <http://ijk.tejo.org>. Por ajna demando vi povas kontakti nin ĉe ijk2023@tejo.org aŭ aliĝi al la Telegram-grupo: [ijk_telegramo.org](https://t.me/ijk_telegramo.org). Konsideru ankaŭ donaci al la IJK (ijkb-b) per via UEA-konto.

Sunumu kun ni en la #IJK2023! Ĝis baldaŭ en Lignano Sabbiadoro!

interlingvistiko.net

sendu viajn proponojn antaŭ la 15-a de Majo!

45-A ESPERANTOLOGIA KONFERENCO DE CED

La organizantoj alvokas ĉiujn fakulojn, esploristojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la 45-a Esperantologia Konferenco de CED. La aranĝo estos hibrida, ebligante partoprenon rete kaj ĉeeste, kadre de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio.




3a kaj 4a de Aŭgusto · 09:00 - 12:00
Politecnico di Torino (Italia)

Sukcese okazis la 5-a Speciala Ekskurso 2023 en Nepalo

■ Bharat Ghimire,
Renato Corsetti

Malgraŭ multaj enlandaj kaj internaciaj obstakloj, la 5-a Speciala Ekskurso de Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) okazis de la 26-a februaro ĝis la 8-a de marto 2023. Tio ĉi estas la unua vere fruktodona programo por la Esperanto-movado en Nepalo de post la komenco de la Kovimo-pandemio.



Partoprenis la tutan programon entute 18 esperantistoj, kaj simila nombro diversajn partojn de ĝi. La partoprenintoj inkluzivas 1 personon el Kanado, 2 el Suda Koreio kaj 4 el Japanio; ĉiuj aliaj estis nepalanoj. La ĉi-jara programo celis inviti esperantistojn de ĉiuj aĝ-grupoj ĝui mondfamajn lokojn de Nepalo kaj samtempe antaŭenigi la enlandan Esperanto-movadon. Dum la ekskurso, partoprenantoj kuraĝigis homojn lerni Esperanton kaj interŝanĝi ideojn kaj sciojn, kaj konigi sian propran kulturon. La programo komenciĝis la 26-an de februaro per akcep-

tado de la gastoj, kiujn NEspA formale bonvenigis en la vespero de la 27-a en la Marsyangdi-hotelo en Thamel. La prezidantino de NEspA s-ino Indu Devi Thapaliya, estrino de la renkontiĝo, s-ro L.P. Agnihotry, d-ro Mukunda Raj Pathik, s-ro Philip Pierce kaj la speciala gasto s-ro Hori Yasuo deziris sukceson al la renkontiĝo. Parolis ankaŭ la 90-jara kaj tamen ankoraŭ tre vigla partoprenanto s-ro Yamamoto Akiya. Estis iom emocia okazo, ĉar la plimulto el ni ne renkontiĝis unu kun la alia vizaĝ-al-vizaĝe de post la komenco de la pandemio. NEspA ricevis bondezirmesaĝojn el diversaj partoj de la mondo.

Dum la sekvaj tagoj la ĉeestantoj vizitis multajn belegajn kaj historiajn lokojn, inkluzive de la Katmandua valo, diversajn sanktejojn, la nacian parkon Chitwan [ĉitŭan], turismajn urbojn kaj aliajn. La ĉeestantoj ekskursis interalie per ĵipo kaj per boato, kaj vidis rinoceron de tre proksime en ĝia natura loĝloko.

La grupanoj tranoktis dum du noktoj en privataj domoj, tiel ke ili povis sperti vivmanieron malsaman al la propra: la manĝaĵojn, vestaĵojn kaj aliajn aspektojn de la vivo en nepalaj vilaĝoj en la suda parto de la lando. Ili ankaŭ vizitis montaran regionon, kie ili vidis la famajn montojn Machhapuchhare, Annapurna kaj Dhaulagiri [maĉpuĉhare, anapurna, daŭlagiri].



La ekskursantoj vizitis la historian urbon Gorkha [gorĥa], kiu ludis gravan rolon en la fondiĝo de la moderna Nepalo. La palaco de Gorkha, kiu troviĝas je 1000 metroj super la mar-nivelo, estis konstruita en la 16-a jarcento. Tie naskiĝis la reĝo Prithvi Narayan Shah (1723–1775), kiu komencis la unuigon de la lando. Oni nun konsideras lin la Patro de la Nacio. De tie venas ankaŭ la mondfamaj Gurkaj soldatoj.

En la lasta vespero ĉiuj eksterlandaj gastoj esprimis kontentecon pri la vojaĝo, precipe ĉar ĝi estis planita por ke ankaŭ maljunuloj povu partopreni.

Ĉi tiu teksto estis kunmetita de Renato Corsetti, surbaze de raporto de Bharat Ghimire kaj de resumo de ĝi aperinta en <https://mallonge.net/yb> kiel danko pro la provoj de la nepala asocio rekapti la normalan agado-ritmon de la antaŭaj jaroj kaj kiel instigo al esperantistoj subteni ĝin.

Papere, Poŝte, tamen Persiste

■ Huzimaki ken'iti

Korespondaj kursoj por japan-lingvanoj fare de Esperanto-Societo en Numazu (Japanio) atingis 1819 aliĝojn la 6-an de marto 2023. El la aliĝintoj preskaŭ duono finstudis en iu(j) el la kursoj: enkonduka, punta kaj mezgrada. La nombro 1819 ne estas tiel granda, se ni scias, ke la kurso enkonduka ekis en la jaro 1988 kaj daŭris ĉirkaŭ 35 jarojn. La atingo des pli perdas la brilon, ĉar averaĝe estis nur 50 aliĝoj jare. Helike, testude, lante, tamen la kursoj iel marŝis paŝeton post paŝeto.

En la jaro 1988, surbaze de la ĝis-tiama sperto de dek-leciona senpaga koresponda kurso, Esperanto-Societo en Numazu komencis novan pli ampleksan kaj pagan korespondan kurson, kiu havis 16 lecionojn kaj kvar sonbendokasedojn (nun anstataŭe kun tri kompaktaĵoj). Dek unu jarojn poste, en la jaro 1999, ni kreis mezgradan korespondan kurson por "progresantoj". Tiu ĉi mezgrada kurso estas tre (aŭ iom tro) ampleksa kvante kaj kvalite. Por ŝtopi la grandan distancon inter la enkonduka kaj la meza, ni kreis "ponto-kurson" en la jaro 2019.

Per la elementa la kursanoj povas trarigardi la strukturon de Esperanto ĉefe el gramatika vidpunkto. Per la punta oni povas kutimiĝi al legado per rakontoj de Andersen tradukitaj de Zamenhof. Per la meza oni povas ekzerci la orelojn per notado (diktado) de voĉlegitaj tekstoj registritaj en kompaktaĵoj; verki frazojn aŭ eseojn; ekzerci la buŝon per plurfoja voĉlegado de teksto; informiĝi pri la historioj de la Esperanto-movado internacia kaj japana; koni movadajn organizaĵojn mondajn kaj japanajn.

La kursoj ekiris per papero kaj poŝto, iom poste per faksimilo, kaj nun parte kaj laŭbezzone per PDF kaj retpoŝto. Sed ankoraŭ nun principe ili iras per la rimedoj papera kaj poŝta.

Pro la pandemio ni spertis (aŭ estis devigataj) utiligi modernan telekomunikan sistemon por niaj kongresoj kaj renkontiĝoj. Fakte tio montris al ni novan kaj utilan vojon. Do, en tiu ĉi erao de interreta teknologio kaj artefarita inteligento eble oni mokas la primitivajn rimedojn. Sed ne tro hastu konkludi. Komputilo aŭ saĝtelefono ligita al Interreto ne estas cent-elcente disvastiĝinta tra la mondo. Iuj el la maljunaj homoj estas ankoraŭ ekskluditaj el la moderna teknologio. Kaj elektronikaj ekipaĵoj ne estas ĉiopovaj. Sen liverado de elektro ili fariĝas stultaj objektoj, kiuj vane okupas spacon. Grandskala elektronika sistemo povas havi negativan flankon: monopoli informojn kaj totalisme regi la popolanojn. Do, ne moku primitivajn ilojn, ekzemple,

alumetojn aŭ fajloŝtonojn, kiuj fariĝos utilaj en iuj ekstremaj ĉirkonstancoj kaŭzotaj de granda natura (aŭ socia) katastrofo.

Cetere, pripensu, ke Esperanto jam estas unu el la malmalmodernaj metioj, kies rolon, almenaŭ parte, povus tre baldaŭ preni maŝin-traduko fare de fulmrapide progresanta artefarita inteligento. Esperanto mem estas jam primitiva komunikilo, kiu funkcias per niaj buŝo, oreloj kaj cerbo (tamen sen elektro).

La interreta telekomunikado trans fizika distanco estas tre utila rimedo. Sed ĝi ne povas cent-procente anstataŭi la vid-al-vidan komunikadon. Ni volas vidi la vizaĝon kaj senti spiron de la kunparolanto rekte, ne tra ekrano; ni volas premi la manon kaj brakumi nin reciproke.

Ni nun havas diversajn veturilojn, sed ni amas mem marŝi, kuri, grimpi. En vendejoj abundas manĝaĵoj jam pretaj, sed ni amas kuiri per niaj propraj manoj. Multaj homoj amas kreskigi legomojn en sia malvesta ĝardeno, anstataŭ aĉeti ilin en vendejoj. Oni amas aktivi per siaj propraj korpopartoj. Do, se la artefarita inteligento ebligas maŝininterpreton (tio jam estas efektiviĝanta), ne ekstermiĝos homoj, kiuj volas komunikiĝi per siaj propraj buŝo kaj oreloj kun alilingvanoj per primitiva Esperanto rekte vid-al-vide.

La tri kursoj estas pagendaj. Kvankam la kotizoj estas modestaj kompare kun tiuj de instruado de naciaj lingvoj, la gajno sufiĉas por funkciigi la kursojn memstare, sen iuj ajn subvencioj. En la japana socio "senpaga" ofte signifas "malbonkvalita", eĉ "trompa". Pago garantias respondecon de ambaŭ flankoj: gvidanto kaj gvidato.

La kursoj iras survoje al 1900 aliĝoj, lante kaj testude.



Birdo Nuĉjo

Raporto pri la Junulara Esperanto-Semajno 2022-2023 kaj kial ĝi estis elstare unika

■ Christine Bizonon

La Junulara Esperanto-Semajno (JES) estas ĉiujara evento, kiu estas organizata normale de la Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj la Pola Esperanto-Junularo (PEJ) dum la jarŝanĝo. Ĝi estas celita al junuloj de la tuta mondo kaj de ĉiuj aĝoj, kiuj parolas Esperanton.

La lasta JES okazis en la jaroj 2022-2023 en la apudeco de Oranienburg en Germanujo, sub la respondeco de Christine Bizonon, la unua privata organizanto, kaj organizado de JES. Ĉi tiu artikolo en Esperanto prezentas la unikajn aferojn, kiuj okazis dum tiu evento.



Unu el la plej unikaj aferoj de tiu lasta JES estis ĝia organizado sub la respondeco de privata persono. Kvan-kam la evento kutime estis organizata fare de GEJ kaj PEJ, ĉi-jare tiuj organizoj decidis ne okazigi JES pro manko de homoj kaj forto. Tamen, du personoj, Christine Bizonon kaj Karlos, deci-

dis preni la iniciaton kaj organizi la eventon mem. Tio estis vere unika okazo en la historio de JES.

Tamen tio ne signifas ke tiuj du personoj faris ĉion solaj, ne! Tuj ekestis granda internacia teamo de homoj el Danio, Germanio, Francio kaj Hispanio. Ĉiu persono transprenis taskon kaj ene de tio memstare rajtis decidi kaj agi. Pro tio, laŭ mi, la teamo ege bone kunlaboris kaj solvis ĉiajn eblajn malfacilaĵojn. Krome la Dana Esperanto-Junularo (DEJ) kaj la Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ) helpis per pruntado de mono, por pagi la antaŭpagon al la domo. Poste reeniris GEJ al la teamo por helpi kaj havi dum JES sian jarĉefkunsidon.

La lasta JES okazis post la pandemia paŭzo kaj pro tio estis malfacile taksu ĉion kaj bone plani. Ĝuste pro tio estis ege helpe kaj unike ke ni ekhavis privatulojn, kiuj pere de donacado de monsumo helpis kaj iĝis patronoj de JES 2022-2023. Ni kore dankas al JC kaj Clemens el Germanio!

Tiu monsumo iris al nia JES-fonduso por ebligi ĉeeston de ne tiom riĉaj personoj.

La lasta JES havis multajn unikajn aferojn, elstara estis la barela saŭno. Ĝi ege utilis kaj post la novjara banado la saŭnado okazis eĉ kun koncerto ĉe la saŭno.

Ni havis post la longa paŭzo jenajn planitajn koncertojn en diversaj tagoj: de La Perdita Generacio, de Jon-




ny M, de Kajto kun gvidado de bal-folk-dancado dum silvestro, kaj de Gijom. Krome estis spontanaj koncertoj de la Kuracistoj, de Ĵele, de Melono kun trumpetisto, kaj de Demlin sola kaj kun Devid, de Gavan kun Lesley kaj kompreneble la tuta JES-orkestreto.

La elstara internacia vespero kun tre bonkvalitaj kontribuoj estis ankaŭ granda momento dum la lasta JES. La partoprenantoj povis sperti multajn diversajn kulturojn, kaj la prezentantaj homoj estis tre talentaj kaj profesiaj. Unu el la plej unikaj aferoj de la lasta JES estis la improviza teatro kaj ĝia prezento. Ĝi estis tre amuza kaj la spektantoj havis grandan plezuron. Krome, estis ankaŭ komuna muzikumado kaj prezento de eta orkestro sub la gvido de Gavan kune kun LPG kaj kiel lasta la plej longa bambado per vivanta muziko.

Ankaŭ la vizito de Berlino libere kun eta ludo de "actionbound" programeto estis grava momento, ĉar amikino kreis speciale esperantlingvajn klarigojn. La partoprenantoj povis

Fotoj de Ivo





migrante kaj solvante enigmojn per tiu programeto malkovri diversajn sciojn pri Berlino kaj ĝia historio.

Plej multaj homoj ĉeestis dum silvestro kompreneble. Ni festis kun 110 personoj la ekon de la nova jaro kune. Unika estis la manĝebleco, ĉar ni ofertis nur aŭ veganan aŭ vegetaran

manĝon. La rezulto de la mendoj estis ke 30% elektis la veganan kaj 70% la vegetaran manĝon. Por homoj kiuj ege bezonis viandon estis eta kuirejo por memzorgi.

Entute aliĝis 118 personoj, kiuj devenis el 26 diversaj landoj (Germanio, Francio, Italio, Belgio, Neder-

lando, Britio, Pollando, Slovakio, Usono, Barato, Kostariko, Danio, Svedio, Bulgario, Ĉeĥio, Hispanio, Hungario, Irlando, Kubo, Litovio, Mordor¹, Norvegio, Turkio, Svislando, Portugalio, Rusio).

¹ Fikcia lando el verkoj de Dj. R. R. Tolkin

Landa agado

Revigliĝas la renkontoj en la Paraíba-Valo

■ Paulo Sergio Viana

La Paraíba-Valo estas interesa regiono en Brazilo. Ĝi okupas pli ol 16 mil kvadratajn kilometrojn, enhavas dekojn da urboj kaj estas ekonomie, historie kaj kulture grava. Ĝi situas inter la urbegoj San-Paŭlo kaj Rio-de-Ĵaneiro, kaj estas grava ankaŭ por la landa Esperanto-movado: en pluraj tiuj urboj troviĝas grupetoj de esperantistoj, aŭ almenaŭ izolitaj esperantistoj.

Pro tio, de kelkaj jardekoj, oni okazigas en tiu regiono Renkontojn de Esperantistoj, por kunigi tiujn homojn kaj praktiki la lingvon, alterne en ambaŭ ŝtatoj. Tio fariĝis bela tradicio, kiu dum la pandemio de la kronviruso devis ĉesi.

La bona informo estas, ke tiuj eventoj vikle renaskiĝas. La 2-an de aprilo 2023, en la urbo Lorena/SP, okazis unu plia tuttaga renkonto. De la 9-a ĝis la 16-a horo, tridek gesamideanoj kunisdis en "Clube Comercial" por vigla babilado. Luiz Alberto Coelho prelegis pri "Esperanto, kiun estonton?"; Vi-



tor Mendes prelegis pri traduko de kanzonoj kaj kantis; Maurício Monken (esperantisto de pli ol 70 jaroj!) estis intervjuita pri siaj spertoj en la movado kaj ricevis omaĝon en formo de komplimenta plako; Paulo S. Viana prezentis "Guton da gramatiko" kaj "Ludon per proverboj"; Cristina Graaf prelegis pri savado kaj zorgado de bestoj okaze de naturkatastrofoj; Wilian Gomes prelegis pri "Kulturaj Ekskursoj", kiujn Es-

peranto-Asocio de San-Paŭlo nuntempe proponas; reprezentantoj de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro kaj Esperanto-Asocio de San-Paŭlo raportis pri siaj lastatempaj agadoj. Aparte oni diskutis pri la ebleco starigi Esperantobudon en la Libro-Bienalo de Rio-de-Ĵaneiro.

La tuta evento fluis en agrabla amika etoso, kun malgranda libroservo kaj lunĉetoj.

Esperanto en Orienta Timoro: mallonga historio kaj nia nuna agado

■ Lídia Conceição,
Mateus de Sena kaj
Teófilo José Maria
de Jesus

La 12-an de marto 2023 posttagmeze, la Esperanto-klubo La Tri Lagoj en Orienta Timoro kunvenis kaj diskutis pri siaj aktivadoj dum la jaro 2023, ekzemple siaj agado ĉe Radio Liberdade ĉiu-marde kaj interretaj renkontiĝoj por instrui Esperanton al la homoj kiuj interesiĝas lerni. La renkontiĝo okazis en Jardim Motaél, unu el la plej konataj parkoj de Dilio, en la kvartalo Farol. Ekde la pandemio, ni kutime kunvenas ekstere.

Ni forte rekomendis unu al la alia plibonigi niajn kapablojn paroli Esperanton, precipe daŭrigi lerni Esperanton memstare per Duolingo, Jutubo, kaj aliaj aplikoj rilataj al Esperanto, kaj partopreni retajn renkontiĝojn kiel tiuj de Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio, kiuj kunvenas ĉiun dimanĉon.

Ni planas, ke ĉiufoje kiam ni renkontiĝos, ĉiuj parolu Esperanton. Tio ankaŭ povas kontribui al plievoluigo de niaj esperantlingvaj kapabloj

Orienttimoraj esperantistoj jam plurfoje estis petitaj prezenti sian landon kaj/aŭ Esperanto-agadon en tiaj

renkontiĝoj. Lastan fojon tio okazis la 27-an de marto. La internacia klubo de Brazilo, kiu nomiĝas Rotary Esperanto-klubo, invitis Mateus de Sena, aktivulon de nia klubo, prelegi pri la historio de Orienta Timoro kaj ĝia Esperantomovado. Vi povas spekti ĝin ĉe mal-longe.net/desenabrazilo.

Lernado de Esperanto ĉe aŭ pere de la radio ne estas nova afero en Orienta Timoro. Ekde la komenco de la enkonduko de la Esperanta lingvo en Orienta Timoro fare de Heidi Goes en marto 2013, estis pli ol 20 partoprenantoj ĉe la Nacia Radio de Timor Leste (RTTL). El tiuj, du reprezentantoj partoprenis nur mallonge poste en la unua Indonezia Esperanto-Kongreso: José Costa kaj Nuno Saldanha, ambaŭ tre konataj ĵurnalistoj en Orienta Timoro. Dum ŝia dua vizito, en aŭgusto-septembro 2014, estis starigita la unua Esperanto-klubo en Orienta Timoro, La Tri Lagoj, nomita laŭ tri lagoj kiuj ekzistas en Dilio, la ĉefurbo de Orienta Timoro.

Post la kreado de la klubo, aktivuloj kiel Teófilo, Cornelio, Lidia kaj aliaj komencis aktivigi sin en la klubo. Pro tio, en 2015, Teófilo estis invitita partopreni en la Somera Esperanto-Kongreso en Aŭstralio, kaj en la sama jaro, li kaj Cornelio partoprenis la So-

meran Esperanto-Studadon en Martin, Slovakio, ILEI-konferencon en Oostende, Belgio, Universalan Kongreson en Lillo, Francio, kaj IJK en Visbadeno, Germanio. Pluraj individuoj kaj organizaĵoj helpis finance por realigiti tion. Avantaĝo de tiu aktiva partopreno estis, ke ili lernis pli pri Esperanto kaj pri pluraj kulturoj el aliaj landoj, kaj amikiĝis kun aliaj esperantistoj. La rezulto estas ke ĝis nun ni evoluigis Esperanton per agado kaj instruado.

Dum la tria vizito de Heidi en novembro-decembro 2016, pli da aktivuloj aliĝis, kiel Mateus de Sena, João da Cruz, Fréidio, Januaida, Maria Isabel, Fidelito, Carlos, Zerecoronho, Sebastião, Julito, Adroaldo kaj aliaj, kiuj nuntempe ne plu estas aktivaj. En 2017, grandparte pere de la helpo de KAEM, João da Cruz iris al Sud-Koreio, por partopreni la Universalan Kongreson.

Preskaŭ unu jaron poste, en aprilo 2018, dek orienttimoraj esperantistoj partoprenis en la Trilanda Esperanto-Kongreso en Bekasi, Indonezio. Pro sia nombro, ili sukcesis doni prezentaĵon de tradicia orienttimora kantado kaj dancado en tradiciaj vestaĵoj. Kelkaj el ili ankaŭ demonstris kapoejron. En la sama jaro oni el niaj aktivuloj (João, Mateus kaj Teófilo) ankaŭ iris al Portugalio por partopreni la Universalan

Kongreson. En Dilio mem ni en 2018 ricevis novaĵon ke la registaro transformis RTTL, kiu funkciis sub la sekretario de komunikado, en nacian kompanion. La plimulto de la esperantistoj, kiuj laboris por RTTL, ricevis du elektojn: ĉu resti aŭ translokiĝi al aliaj ministerioj. De tiam nia ligo al la nacia radio estis finita kaj ni havis malfacilaĵojn, ĉar RTTL estis konsiderata kiel nia bazo por Esperantaj renkontiĝoj. Ankaŭ s-ro José Costa kiu prezidis nian klubon La Tri Lagoj, estis translokita, do ĝi estis malfacila situacio. Ni ja faris kelkajn renkontojn kaj decidis nomi nin 'junulara klubo', tamen ankoraŭ rekonas la ĉefan klubon: La Tri Lagoj.

Same en 2018 ni ricevis la viziton de Kobashi Ryotaro, japana esperantisto kaj kuracisto. Mateus de Sena estis lia gvidanto dum liaj tri tagoj en Orienta Timoro. Tiam ni havis tri kunvenojn kaj tiel povis bone montri nian ekziston.

En 2019 Teofilo invitis João da Cruz por instrui Esperanton al la infanoj en la kvartalo de Teofilo. Estis dek neformalaj renkontiĝoj kun la celo reklami la lingvon al ili. Nur simplaj metodoj estis uzataj kaj neniuj atestiloj disdonitaj al la lernantoj.

La klubo La Tri Lagoj nun daŭre aktivas, lastatempe danke al Teodosia Reis, tre aktiva ĵurnalistino de Radio Liberdade. Ĉe tiu libera radio ni havas de pli ol jaro regulan radio-elsendon por instrui Esperanton. De tiam, Radio Liberdade servas kiel la neoficiala bazo por la Esperanta movado en Orienta Timoro. La klubo ankaŭ bonŝancis pro Petro Smith, kiu restis pli longe ol aliaj esperantistoj en nia lando. Li estas denaska esperantisto, kaj instruas la anglan kaj tajĉion (ĉina batalarto). Li reiris al Novzelando kiam komenciĝis la pandemio Kovim-19.

Estis surprizo por ni ekscii ke ĉina komercisto, kiu laboras en la marmorekstraktado kaj jam ofte vizitis Orientan Timoron, estas esperantisto. Temas pri Song Bing, aŭ en Esperanto, Sonbendo. Li estas konfidulo de la nuna prezidento de la respubliko, José Ramos Horta, kiu ankaŭ montras sian entuziasmon pri la junularaj grupoj en la lando, neekskludigante la Esperanto-movadon.



Tamen, kiom ajn entuziasmaj ili estas, la homoj en nia lando malvolontas lerni Esperanton pro pluraj kialoj. Unue, la eta insula nacio mem havas pli ol 30 malsamajn lingvojn, aldonante la portugalan, indonezian kaj anglan lingvojn. Do kutime homoj parolas plurajn lingvojn. Pro tio, ili eble malvolontas aldoni plian lingvon, ĉar la malavantaĝo koni pli da lingvoj estas ke oni eble intermiksos unu lingvon kun la alia, aŭ ili simple ne povas havi tempon por lerni. Estas zorgo inter la politikistoj por koncentriĝi pri la portugala, kiu estas unu el la oficialaj lingvoj. La dua kialo estas, ke homoj volas havi tujajn rezultojn. Ekzemple, per lernado de la angla lingvo, ili povas vojaĝi eksterlanden kaj havi laboron en Aŭstralio. La lando nur travivis konfliktojn en la lasta pasinteco, en kiuj la zorgo de la homoj estas plibonigi

sian vivon per agado kun tuja rezulto. La alia kialo estas, ke estas multaj problemoj sekve de la alta procento de senlaboreco. Pro tio la sinteno de homoj al lernado ne estas tiom signifa.

Estis multaj interretaj aranĝoj, kiujn la klubanoj partoprenis dum la Kovim-19-periodo, kiel Universala Kongreso, Internacia Junulara Kongreso, Sudorienta Azia agado, Somera Esperanto-Studado. La revo de la klubmembraro estas ke iam tiu ĉi eta klubo transformos sin en grandan asocion, kiu povas aranĝi eventojn kaj konferencojn, kiuj temas pri Esperanto. Sed antaŭ tio, ni esperas ke pluraj membroj povus iri al la Itala kaj Universala Kongresoj, kaj Internacia Junulara Kongreso, por sperti la etoson, praktiki la lingvon kaj lerni multon pri la movado. Kiu volas helpi al ni, povas fari tion al la UEA-konto 'timoro'. Multan dankon!

Amo, tuso kaj forpaso

Homoj kaj kovimo



Finalistaj noveloj de la
Interkultura Novelo-Konkurso

Ĉu vi volas fizikan
kopion de la libro
"Amo, tuso kaj
forpaso"?

Tuj mendu ĝin ĉe
KAVA-PECH aŭ la
libroservo de UEA!



Movadumi en la post-Jarlibra epoko

■ Amri Wandel

En la ĉi-monata rubriko Anna Lowenstein prezentas sian multjaran projekton, la “Movadan Foiro”. De 2006 ĝi sukcesege akompanas la UK-jn kaj anstataŭas la “Interkonan Vesperon”, kaj donas al la unua kongresa vespero viglan kaj utilan etoson de Esperanto-aktiveca foiro. Dum la pandemio, kadre de la du virtualaj kongresoj kaj dum la posta UK en Montrealo la Movada Foiro plu okazis kaj pruvis ke ĝi povas kaj devas resti populara kaj grava parto de la kongreso. Lige al tio Anna prezentas pledon al UEA repreni sian rolon kiel deponejo de ĝisdataj informoj pri la Esperanto-instancoj en la mondo – ne nur Landaj Asocioj kaj Fakaj Asocioj, sed ankaŭ diversaj organizoj, societoj, muzeoj, eldonejoj ktp. Tiu rolo, kiun en la pasinteco plenumis la Jarlibro de UEA, nun jam de kvin jaroj vakas. La komitato aprobis buĝeton je 0 EUR por la Jarlibro, laŭ propono farita de la Estraro kaj Ĝenerala Direktoro, kio signifis ne-aperigon de papera Jarlibro. Tamen la proponitaj alternativoj – reta Jarlibro, trijara Almanako, nova retejo de UEA – daŭre ne funkcias kaj ne videblas klara alternativo. La Estraro diskutas eventualajn solvojn kaj monrimedojn por subteni tiun gravan projekton.

La Movada Foiro

■ Anna Lowenstein

Ĉi-jare okazos la 17-a Movada Foiro dum la Universala Kongreso en Torino. Ĉu jam la deksepa? La unua Movada Foiro okazis en alia itala UK, en Florenco en 2006.

La Movada Foiro havas la celon doni al la kongresanoj ĝeneralan panoramon de la Esperanto-movado. Amaso da tabloj estas dismetitaj en granda salono interne de la kongresejo, aŭ foje sur ekstera placo. Ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj kaj aliaj movadaj instancoj ricevas spacon ĉe unu el la tabloj, kie ili povas prezenti siajn afiŝojn, informfoliojn, eldonaĵojn, fotojn de sia agado kaj simile. Kutime partoprenas proksimume 80 asocioj, sed en la jubilea kongreso en Lillo estis eĉ 120.

Mi mem havis la ideon pri la Movada Foiro, aŭdinte la komenton de relative nova esperantisto, kiu vizitis la UK la unuan fojon en Vilno en 2005. Li plendis, ke estis amaso da unuopaj kunvenoj, sed ke neniu okazo donis al li ĝeneralan superrigardon pri la Esperanto-movado. Tial en la posta UK en Florenco ni organizis la Movadan Foiro, kaj de tiam ĝi okazas ĉiujare.

La tiama KKS, Clay Magalhães, proponis okazigi la Movadan Foiro dum la Interkona Vesperto, t.e. dum la unua vespero de la kongreso, kaj tio montriĝis tre bona ideo. Ĝi donas al novaj kongresanoj ne nur manieron por ricevi impreson pri la movado, sed ankaŭ kialon por babilu en Esperanto kun spertaj esperantistoj dum ili iras

de unu tablo al alia, demandas pri la ekspozicioj, kaj poste formoviĝas por viziti aliajn tablojn. Por malnovaj geamikoj ĝi donas manieron trovi unu la alian en la homamaso.

Manko de la Jarlibro

Por organizi la Movadan Foiro mi abunde utiligis la informojn en la enkonduko al la Jarlibro, kiu aperis en papera formo ĉiujare ĝis 2018. La enkonduko donis ĝeneralan superrigardon al la movado. Ĝi enhavis listojn de movadaj instancoj, dividitaj laŭfake: landaj asocioj, fakaj asocioj, akademioj, bibliotekoj kaj muzeoj, kulturo, edukado, radio, interreto kaj aliaj.

Post 2018, tamen, ne plu aperis la Jarlibro, kaj de tiam mia tasko fariĝas pli kaj pli malfacila.

UEA ĉesis aperigi la paperan Jarlibron pro financaj kialoj, kun la ideo, ke estonte tiuj informoj troviĝos en ĝia retejo. Tamen la vera kosto pretigi la Jarlibron neniam temis nur pri la presado kaj ekspedado. La vera kosto estis la laboro de redaktoro, kiu dum granda parto de ĉiu jaro kolektadis informojn kaj ĝisdatigis la adresojn. Nun kiam ne plu aperas la Jarlibro, neniu faras tiun laboron.

UEA kiel centra instanco de la Esperanto-movado havas la devon posedi tiujn informojn kaj disponigi ilin al siaj membroj. Se UEA mem ne scias, kie en la mondo troviĝas ekzemple ĉiuj Esperanto-muzeoj, kiu kolektas tiujn informojn? En ĉi tiu reta epoko verŝajne jam ekestis multaj novaj projektoj, kies iniciatintoj eĉ ne plu havas la ideon sendi informojn pri sia agado al UEA.

UEA estis kreita kun la celo, ke ĝi funkcii kiel centra instanco de la Esperanto-movado. Se en certaj aspektoj ĝi ne plu plenumas tiun taskon, ĝi malpli bone respondas al siaj celoj. Anstataŭ esti ĉe la centro, ĝi fariĝos nur margena asocio ĉe la rando de la movado. Eĉ se ĝi ne plu aperigos la presitan Jarlibron, ĝi nepre devas plu kolekti kaj disponigi informojn pri ĉiuj agadoj de la Esperanto-movado.

Alvoko al la Movada Foiro

Se vi deziras prezenti novan iniciaton ĉe la Movada Foiro, skribu al: anna.lowenstein@esperanto.org. Kaj se vi jam ricevis inviton sed ankoraŭ ne respondis, nepre skribu al mi!



Programo "Ni semas" de la Afrika Komisiono: alvoko 2023 al projektoj



"Ni semas" estas programo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), lanĉita en 2015 kiel subvenciprogramo por malgrandaj Esperanto-projektoj. En 2022 ĝia regularo estis reviziita kaj nun la programo funkcias sub kunordigo de la Afrika Komisiono de UEA (AK) kun fokuso al Esperanto-projektoj en Afriko. Kadre de la programo la AK de UEA anoncas konkurson pri subvenciotaj projektoj en la kontinento. Interesatoj partopreni devas koni la regularon kaj preferinde uzi la konkurso-petilon, elŝuteblan en PDF-formato aŭ rekte plenegeblan komputile (<http://mallonge.net/Ni-Semas-Reta-Petilo>).

La subvencipetoj povas temi pri: Esperanto-kursoj por komencantoj aŭ progresantoj; trejnseminarioj por instruistoj; ekzamenpreparoj kaj ekzamenoj; aperigado de lernolibroj kaj aliaj instrumaterialoj adaptitaj al afrikaj bezonoj (afriklingvaj kaj afrikec-enhavaj); kultura interŝanĝo kun aliaj mondopartoj per Esperanto; financado por sendo de skrib- kaj lern-materialoj por lernantoj; informa agado en superaj lernomedioj ktp.

La proponoj konsistu el priskribo de la projekto (ne pli longa ol unu paĝo) kaj financa plano de la projekto sur alia paĝo. La financa plano klare indiku la bezonatan sumon: la programo subvencias ĝis maksimume 100 EUR; se la bezonata sumo superas tion, la projektoportanto devas klarigi la fontojn de la alia parto. Oni prefere uzu la petilon por sendi la petojn. Ĉiuj koncernaj dokumentoj kaj dosieroj rilataj la petojn devas esti senditaj al la retadreso nisemas@co.uea.org, kies ricevantoj estas membroj de la Afrika Komisiono. La Afrika Komisiono ricevos petojn progresive kaj la lastan sabaton de ĉiu monato respondos al petantoj.

La kriterioj por aljuĝo de la plena subvencio baziĝos sur la realismo de la projekto kaj de la petata financa subteno. Oni rajtas peti subtenon por pli ol unu projekto dum unu jaro. La kapablo de la petantoj mem financi parton de la kostoj aŭ trovi aliajn fontojn aldone al la petata subvencio ne estas

nepra kondiĉo, sed faktoro konsiderota. Esperantistoj dezirantaj subteni la programon kaj la Esperanto-agadon en Afriko povas fari liberajn donacojn al la Fondaĵo Afriko de UEA: <http://uea.org/alighoj/donacoj/afriko>.

El la gazetaraj komunikoj

Kie estas la sekva plej bona novelo?

3-a Interkultura Novelo-Konkurso

LA ALIĜILO JAM MALFERMAS!

Kun la temo: la sekreta vivo de miaj najbaroj

La 3-a Interkultura Novelo-Konkurso okazas nun!
<https://bobelarto.ink/konkurso>



Aliĝu al la 108-a Universala Kongreso de Esperanto,
kiu okazos en Torino, Italio,
de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023:

uk.esperanto.net/2023